

esperanto

APRILLO 1990 • 83-A JARO • N-RO 1012 (4)

ISSN 0014-0635



- Kiel jure protekti la medion?
- Greno kaj pajlo: la roman-rikolto recenzita
- Por kaj kontraŭ la esperantigo de propraj nomoj



La logo de la Esperanta libro

Enhavo

- 69 Ekologio: Okaze de la Tago de la Tero; Resumo de proponitaj juraj principoj pri protektado de la medio
- 70 Varbu anoncojn, ricevu makleraĵon!
- 71 Scienca aplikado: Tria pola sesio lanĉas AIS-filion en Bjalistoko
- 72 Instruado: Tutlanda televida kurso en Ĉinio (Dai Songen); Nova etapo en Hungario (Oszkár Princz)
- 73 Regiona agado: De la deka lingvo ĝis la dua (Hans Erasmus)
- 74 Informado 4: Konservu la entuziasmon (Ivo Durwael)
Librofoiroj: E-libroj allogas en Havano (Orlando Raola González)
- 75 Libroservo: Flugi kiel Kajto
- 76 Recenzoj: *Adolesko* de Blazio Vaha, kaj *Sed nur fragmento* de Trevor Steele (Mark Fettes); *Mariagnes* de Lorjak, kaj *Vivi estas danĝere* de István Nemere (Donald Broadribb); *Sub cirkotendo* de Stan Bubenîc (Georgi Marinov Mihajlov); *Kromosomoj* de Lorjak, kaj *Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas* de Manjo Austin (Eduard V. Tvarožek); *Nigra magio* de Deck Dorval kaj Christian Declerck (Georgo Kamaĉo); *La komedio de eraroj* de William Shakespeare, trad. William Auld kaj Asen Simeonov (Viktor Sapoĵnikov); *Puphejmo* de Henrik Ibsen, trad. Odd Tangerud (Kalle Kniivilä)
- 80 Lingvo: Ĉu aŭ ne renomi la mondon?; Ne fermu la fenestron al aliaj kulturoj (Roland Schnell); Sisteme, ne ŝulce (Bernard Golden); Vojoj el la propranoma labirinto; Latinlitera Esperantokonforma Interfonemaro (Ĝo Gêmbll)
- 83 Reagoj: Distingi ludojn kaj evoluon (Klaus Schubert); La vera minaco (J. Ducrocq); Kial al la kurso? (Oszkár Princz); Ne sur fremda tero (Josep M. Altadill Alcoverro)
- 84 Kongresa Komunikado de la 75-a Universala Kongreso en Havano
- 85 Nekrologoj
- 86 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
Foliume (pripresaj raportetoj)
- 87 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 88 Oficiala informilo
Starigo de Voluntula Fondajo

Vi trovos,

ke la premo de aliaj aferoj iom bremsis nian emon ŝtopi ĉiujn 20 paĝojn de la nuna numero per fasko da atendantaj recenzoj. Ve, tiu ĉi revuo ne rajtas tiel limigi sin. Kiam ĉinoj kaj hungaroj raportas senprecedencajn paŝojn en la lingvoinstruado, kiam poloj starigas novan bazon por la scienca agado kaj kubanoj sukcesas vekti sian tutan socion al la ebloj de Esperanto, tiam la invita brakseĝo apud la librobreto devas ankoraŭ iom atendi. Sed ni sukcesis tamen ŝteli kelkajn minutojn. Espereble ankaŭ vi trovos tempon por foliumi niajn paĝojn, preni leterpaperon kaj sendi mendon al nia Libroservo. Ja verkistoj ne povas ekzisti sen legantoj, nek eldonistoj sen aĉetantoj.... Sciuj ankaŭ, ke la maja numero, kun la Estrara Raporto pri 1989, estos pli leginvita ol kutime, kaj ke la junia numero provizos fascinan fenestron al la ŝanĝoj en orienta Eŭropo. Rezervu la brakseĝon jam nun – kaj invitu amikon kunlegi! Ekzemple, ĝuste en orienta Eŭropo oni soifas je libroj kaj abonoj.

La kovrilo: Orlando Raola disdonas nacilingvan flugfolion ĉe la Havana Librofoiro. Nia literaturo havas varban forton – kiel ekzemple la vico de romanoj recenzitaj ĉi-numere.

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 48,75; US\$ 23; GM 43; enoj 3600; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1540, 1/2 p. 850, 1/4 p. 470, 1/8 p. 260, 1/16 p. 150. Movada rabato 50%. Eksterakviritaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefakso: +3110 436 17 51.

Teleksa: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: vakas.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigado, planado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. (01) 542 0302; telefakso (01) 383 4108.

Vicprezidanto (regiona agado, turismo, Fondumo Zamenhof): s-ro Roman Dobrzyński, u. Majdańska 13 m 91, PL-04-088 Warszawa, Pollando; tel. (22) 10 35 05.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj, esperantologio): d-ro Ulrich Lins, Gemarckenstr. 150, D-5000 Köln 80, FR Germanio; tel. (0221) 680 32 50.

Ĝenerala Sekretario: s-ro Osmo Buller, Suksitie 4 B 15, SF-93400 Taivalkoski, Finnlando; tel. (988) 51 003; telefakso (988) 51 681.

Estrarano (informado): s-ro Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, B-2520 Edegem, Belgio; tel. (03) 440 30 92.

Estrarano (financo, junularo): s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estrarano (landaj kaj fakaj asocioj): s-ro Oszkár Princz, Sallai u. 4. II.3, H-1136 Budapest, Hungario; tel. (HEA) (1) 15 60 244.

Estrarano (azia agado, aplikado en scienco): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 11, Seoul - 158-600, Korea Respubliko; tel. (02) 646 5413; telefakso (02) 275 0633.

Estrarano (kulturo): s-ino Spomenka Štimec, Nova Ves 87, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio; tel. (041) 42 92 51; telefakso (041) 42 12 94.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendahl, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47; telefakso (1) 43 66 09 92.



Foto: Ivan Šiškov

Ekologio:

Okaze de la Tago de la Tero

La 22-an de aprilo ĉi-jare, la tuta mondo solenis la duan Tagon de la Tero. La unuan Tagon oni festis antaŭ 20 jaroj, precipe en Usono, kie en multaj urboj oni haltigis la aŭtotrafikon, organizis amasan kolektadon de forĵetaĵoj kaj manifestaciis ekster la plej venenigaj fabrikoj.

La organizantoj de la nuna festo antaŭvidas, ke ĝi fariĝos la plej granda manifestacio en la monda historio, responde al la tutgloba ekologia krizo. Ĝi lanĉos "jardekon de la medio", en kiu oni strebos fundamente ŝanĝi la rilaton inter la homa socio kaj la naturo.

Kompreneble, la Esperanto-movado trovas konvenan lokon kadre de tiuj streboj. Interalie, ĝuste la Tago de la Tero donas taŭgan okazon por prezenti nian "ekologian lingvon" kiel mondan ligilon por ekologiistoj. Espereble multaj lokaj kluboj kaj aktivuloj engaĝiĝas por tio. Sed ankaŭ inverse, la Tago povas servi por altigi nian konscion pri ekologiaj problemoj kaj solvoj. Tial jene prezentiĝas provtraduko de jura principaro pri protektado de la medio. La originalo aperis en la Raporto Brundtland Nia komuna estonteco, kiun speciala komisiono de Unuiĝintaj Nacioj eldonis en 1987. Ĝin esperantigis Kanbera Esperanto-Klubo sub la gvido de sia prezidanto Ralph Harry, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, okaze de la Tago de la Medio 1989.

(kun danko al Jan Książek, Pollando, pro la informo kaj instigo)

Resumo de proponitaj juraj principoj pri protektado de la medio

I. ĜENERALAJ PRINCIPOJ, RAJTOJ KAJ RESPONDECOJ

1. *Fundamenta Homa Rajto.* Ĉiuj homoj havas homan rajton al medio adekvata por ilia sano kaj bonstato.
2. *Intergeneracia Justeco.* Ŝtatoj devas konservi kaj uzi la medion kaj naturriĉaĵojn por la bono de la nuna kaj estontaj generacioj.
3. *Konservado kaj Daŭrigebla Uzado.*

Ŝtatoj devas konservi ekosistemojn kaj ekologiajn procezojn esencajn por la funkciado de la biosfero, devas konservi biologian diversecon kaj observi la principon de plej bone daŭrigebla rikolto/rendimento, uzante vivantajn naturriĉaĵojn kaj ekosistemojn.

4. *Mediaj Normoj kaj Kontrolado.* Ŝtatoj devas starigi adekvatajn normojn de medio-protektado kaj kon-

troli ŝanĝojn en kvalito de la medio kaj uzado de riĉaĵoj, kaj publikigi ĉirilatajn informojn.

5. *Antaŭaj Mediaj Taksoj.* Ŝtatoj devas fari aŭ postuli antaŭajn mediajn taksojn de proponita agado, kiu eble signifas tuŝos la medion aŭ la uzadon de naturriĉaĵo.

6. *Antaŭa Anonco, Aliro kaj Taŭga Proceduro.* Ŝtatoj devas informi ĝustatempe ĉiujn personojn, kiujn verŝajne signifas tuŝos planata agado, kaj ebligi al ili egalan aliron kaj taŭgan proceduron en administraj kaj juĝeaj procezoj.

7. *Daŭrigebla Evoluo kaj Helpo.* Ŝtatoj devas certigi, ke konservado estu traktata kiel integra parto de la planado kaj plenumado de evoluiga agado, kaj provizi helpon al aliaj Ŝtatoj, super ĉio al evoluantaj landoj, subtene al protektado de la medio kaj daŭrigebla evoluo.

8. *Ĝenerala Devo Kunlabori.* Ŝtatoj devas kunlabori bonafide kun aliaj Ŝtatoj plenumante la antaŭajn rajtojn kaj devojn.

II. PRINCIPOJ, RAJTOJ KAJ DEVOJ RILATE TRANSLIMAJN NATURRIĈAĴOJN KAJ ENTRUDIĜOJN EN LA MEDION

9. *Racia kaj Justa Uzado.* Ŝtatoj devas uzi translimajn naturriĉaĵojn laŭ racia kaj justa maniero.

10. *Prevento kaj Plibonigo.* Ŝtatoj devas preventi aŭ malpliigi iun ajn transliman median entrudiĝon, kiu povus kaŭzi aŭ kiu kaŭzas signifan difekton (sed kun rigardo al iuj esceptoj preskribitaj en Artikoloj 11 kaj 12 sube).



La nederlanda organizaĵo "Miliendefensie" (Mediodefendo) uzas ĉi tiun skulptaĵon de David Gilhooly por bildigi la detruan efikon de troa konsumado.

11. *Rigora Devo.* Ŝtatoj devas uzi ĉiujn prudentajn preventajn rimedojn por limigi la riskon kiam ili plenumas aŭ permesas iujn danĝerajn sed utilajn agadojn, kaj devas certigi, ke kompensopago estu provizata se signifa translima malbono okazos, eĉ kiam la agoj ne estis konataj kiel malbonigaj je la tempo kiam oni ilin entreprenis.

12. *Antaŭaj Interkonsentoj Kiam la Kosto de Prevento Multe Superas al la Malbono/Damaĝo.* Ŝtatoj devas intertrakti kun la tuŝita Ŝtato pri la justaj kondiĉoj, laŭ kiuj la agado povus esti plenumita, kiam ili planas plenumi aŭ permesi agadon, kiu kaŭzos transliman malbonon, kiu estus signifa sed multe malpli ol la kosto de prevento. (Se neniu interkonsento estas atingebla vidu Art. 22).

13. *Nediskriminacio.* Ŝtatoj devas apliki minimume la samajn normojn por primediaj konduto kaj efiko rilate translimajn naturriĉaĵojn kaj entrudiĝon en la medion, kiujn ili aplikas interne de la Ŝtato (t.e. ne faru al aliaj tion, kion vi ne farus al viaj propraj civitanoj).

14. *Ĝenerala Devo Kunlabori pri Translimaj Mediaj Problemoj.* Ŝtatoj devas kunlabori bonafide kun aliaj Ŝtatoj por atingi plej bonan uzadon de translimaj naturriĉaĵoj kaj efikan preventon aŭ malpliigon de translimaj mediaj entrudiĝoj.

15. *Interŝanĝado de Informoj.* Originŝtatoj devas provizi oportunajn kaj uzeblajn informojn al la aliaj koncernataj Ŝtatoj pri translimaj naturriĉaĵoj aŭ entrudiĝoj en la medion.

16. *Antaŭaj Taksoj kaj Avizoj.* Ŝtatoj devas provizi antaŭan kaj oportunan avizon kaj uzeblajn informojn al la aliaj koncernataj Ŝtatoj kaj fari aŭ postuli median takson de planata agado, kiu eble havos signifan transliman rezulton.

17. *Antaŭa Konsultado.* Originŝtatoj devas konsultiĝi frue kaj bonafide kun

aliaj koncernataj Ŝtatoj rilate ekzistantajn aŭ eblajn translimajn entrudiĝojn en ilian uzadon de natura riĉaĵo aŭ en ilian medion.

18. *Kunlaboraj Aranĝoj por Media Taksado kaj Protektado.* Ŝtatoj devas kunlabori kun koncernataj Ŝtatoj pri kontrolado, scienca esplorado kaj la preskribo de normoj rilate translimajn naturriĉaĵojn kaj entrudiĝojn en la medion.

19. *Krizaj Situacioj.* Ŝtatoj evoluigos planojn por eventualaĵoj rilate krizajn situaciojn, kiuj verŝajne kaŭzos translimajn entrudiĝojn en la medion, kaj tuj avertos la koncernatajn Ŝtatojn, provizos rilatajn informojn al kaj kunlaboros kun ili, kiam krizoj okazas.

20. *Egala Aliro kaj Traktado.* Ŝtatoj donos egalan alirrajton, justan jurprocedon kaj egalan traktadon en administraj kaj juĝaj procezoj al ĉiuj personoj, kiuj estas aŭ povus esti tuŝitaj de translimaj entrudiĝoj en ilian uzadon de naturriĉaĵo aŭ de la medio.

III. ŜTATA RESPONDECO

21. Ŝtatoj devas ĉesigi agadon kiu malobservas ilian internacian devon rilate la medion, kaj devos provizi kompensopagon pro la damaĝo kaŭzita.

IV. PACA SOLVO DE DISPUTOJ

22. Ŝtatoj devas solvi mediajn disputojn per pacaj metodoj. Se reciproka interkonsento pri solvo aŭ pri aliaj aranĝoj por la fino de disputo ne estas atingita ene de 18 monatoj, la disputo devas esti submetita al konciliacio*, kaj se tio ne ebligas solvon, al arbitracio aŭ juĝa solvo je la peto de iu koncernata Ŝtato.

*konciliacio: interkonsentiga servo aŭ instanco

Varbu anoncojn, ricevu makleraĵon!

La revuo *Esperanto* atingas legantojn en pli ol 100 landoj. En la plej bonfartaj landoj de la mondo ĝi havas pli ol 5 000 abonantojn, en la malfermiĝantaj landoj de orienta Eŭropo ĝin efektive legas minimume sama nombro. Tio estas jam signifa merkato. Por Esperantaj entreprenoj, la revuo de UEA donas ligon al la plej aktivaj individuoj kaj centroj de la movado. Por nemovadaj firmaoj, ĝi proponas senkonkurence vastan gamon de kontaktoj.

Varbante tian nemovadan anoncon por la revuo *Esperanto*, vi ricevas makleraĵon de 30%. Kontrolu mem la tarifojn ĉe la interna kovrilo: tio signifas enspezon de pli ol 450 gld. pro unu tutpaĝa anonco! Por ni via sukceso kompreneble valoras eĉ pli. Ne nur ĝi plibeligas la financon rezulton de la revuo – en si mem ĝi konsistigas trafan praktikan aplikon de Esperanto.

Petu anoncvarbilon de la Centra Oficejo: aktuale haveblan en Esperanto kaj la angla, ĝi povos aperi an aliaj lingvoj se ekzistas sufiĉa bezono. La Oficejo disponigos kelkope ankaŭ varbekzemplerojn de la revuo, nun pli viglaspekta kaj alloga. Kaj ek al la telefono: ĉu apud vi ne troviĝas internaciema komercisto, kiu post eta instigo...?

Scienca aplikado:

Tria pola sesio lanĉas AIS-filion en Bjalistoko

En novembro 1989, seppersona delegacio el Bjalistoko, gvidata de la urbestro Jerzy Csaban kaj la rektoro de la politekniko prof. Kazimierz Pieńkowski, subskribis en Berlino kontraktojn kun Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino. Unu el tiuj kontraktoj koncernis la konstruon de "Akademia Domo" en Bjalistoko, kiel parto de la projekto por Esperanto-Centro Zamenhof. Alia fiksas la bazon por scienca kunlaboro inter la politekniko kaj AIS.

La unua konkretiĝo de tiu kunlaboro estis "tria pola AIS-sesio", kiu okazis en Bjalistoko inter la 17-a kaj 25-a de februaro 1990. Partoprenis 60 personoj, ĉefe el FR Germanio, Italio, Pollando kaj Sovetunio, sed ankaŭ el Aŭstrio, Brazilo, Ĉinio, Jugoslavio kaj Svislando. Ĉio okazis en tre bone ekipitaj, oportunaj konstruaĵoj de la Politekniko; iom da administra kaoso devenis de la misproporcio inter la priservantoj kaj la priservatoj.

La semajna programo proponis densegajn okupojn kun elekteleco, kion oni ŝanĝis laŭ la petoj de la plej sciavida aŭskultantaro por ebligi partoprenon en ĉio. La kursfinaj ekzamenetoj tamen konfirmis, ke ne al ĉiuj sufiĉis forto por tio. Okazis ankaŭ

Akademia Forumo pri Ekologio (la ĉeftemaro de la sesio), dum kiu oni formulis sciencajn revojn apud agadprogramo, kiu fariĝis AIS-dokumento. Dum solena kunsido de du senatoj, la ministro pri nacia edukado, prof. Grzelak, esprimis la volon kunlabori por evoluigi la interbranĉan kaj internacian aktivadon de sciencistoj pere de Esperanto.

La plejparto de la aŭskultantaro celis kolekti pereksamine la regularajn studunuojn, kiuj rajtigas fineksameniĝi post kelkjara sesi-partoprenado (en diversaj landoj). Per adapta adopto magistriĝis A. Bernatowicz, E. Gorzka, D. Tyblewska-Kundzicz kaj doktoriĝis A. Brozi (onidire plej impone) kaj Z.



Galor – ĉiuj el Pollando. Originalan doktordisertacion pri lingvistika kibernetiko prezentis Qiao Yi el Ĉinio.

En la kultura programo oni spektis *La eta princo* en interpreto de B. Łukaszewska, aŭskultis kortuŝan koncerton de Jerzy Handzlik, kunkantante liajn kanzonojn, regaliĝis per poemoj de L. Ligęza kaj la muziko de ĉambra kvarteto. Akcepto de la urbestro kaj dancvespero kompletigis la distran flankon de semajno da pena kaj inspira laboro.

laŭ raporto de T. Tyblewski (Pollando)



Supre, dekstre: Prof. Helmar Frank (maldekstre) kaj rektoro Kazimierz Pieńkowski manpreme sigelas sian kunlaboron. Malsupre: Ampleksa publiko ĝuis la prelegojn kaj eltenis la ekzamenojn.

Septembru science kun AIS!

1-10 septembro 1990,
San Marino:
Sepsa Sanmarina Universitata Sesio
(SUS 7)

12-14 septembro 1990,
Poprad, Ĉeĥoslovakio:
INTERKIBERNETIK '90,
kun kursoj de AIS

14-25 septembro 1990,
Bjalistoko, Pollando:
Oka Sanmarina Universitata Sesio
(SUS 8)

Informoj, aliĝiloj, regularo
haveblas ĉe la adreso:
Prezidanta Sekretariejo de AIS
Kleinenberger Weg 16 B
D-4790 Paderborn,
FR Germanio

Instruado:

Tutlanda televida kurso en Ĉinio

De la 15-a de majo ĝis la 27-a de oktobro ĉi-jare, Ĉina Centra Televida Stacio dissendos trifoje semajne la televidan Esperanto-kurson "Espero". La kurso konsistas el 24 duonhoraj lecionoj. Ĝi havas la formon de televida teatraĵo, kiu harmonie kombinas instruadon kaj amuzadon kaj prezentas Esperanton en tre vivecaj parolsituacioj.

Por faciligi la lernadon, oni jam eldonis lernolibrojn kun detalaj kla-


la filmado la lingvan gvidadon plenumis s-ro Dai Songen. La gramatikajn klarigojn en la filmo prezentis geparolistoj de Radio Pekino: s-ro Liu Junfang kaj s-ino Xue Meixian.

La diversajn rolojn ludis amatoraj geaktoroj, kies Esperanta prononcado ege favore surprizis eksterlandajn esperantistojn. Tiuj ĉarmaj gejunuloj des pli laŭdindas, se oni ekscias, ke ili komencis roli en la filmo post nur dumonata lernado de Esperanto, kaj ke la tuta filmado daŭris nur iom pli ol unu monaton. Se mi listigus ĉiujn malfacilaĵojn renkontitajn dum la filmado, kiujn oni tute ne povas imagi, tiu ĉi artikolo iĝus novelo. Mi ŝatus

citi la vortojn de la prezidanto de ĈEL: "La naskiĝo de la filmo estas miraklo."

Kompreneble troviĝas mankoj en la filmo. Sed tiuj mankoj estas nenio, se kompari kun la rezultoj, kiujn ĝi havigis kaj havigos al la disvastigo de Esperanto. S-ro Roman Dobrzyński, vicprezidanto de UEA, trafe komentis: "Ĉinoj faris revolucion en la Esperanta instruado." En Ĉinio troviĝas 160 milionoj da televidaj aparatoj kaj 600 milionoj da televidspektantoj. Sendube tio donos ĝis nun neimageble vastan eblon al la lernado de Esperanto. Se nur ono el tiuj 600 milionoj spektos la kurson "Espero", tamen milionoj akiros bazajn aŭtentikajn informojn pri Esperanto, kaj oni povas antaŭkalkuli seriozajn lernantojn je enormaj kvantoj. ĈEL kaj la lokaj asocioj jam pretiĝis por alfronti grandegan laboron.

Dai Songen (Ĉinio)



riĝoj, tri kasedojn kaj kvar vidbendojn. Cetere, Ĉina Centra Televida Stacio, Universitato Qingdao, Ĉina Esperanto-Ligo kaj *El popola Ĉinio* kune funkciigos korespondan Esperanto-kurson akompanan al la televida kurso. La aliĝintoj, kiuj sukcesos trapasi la finan ekzamenon en novembro, ricevos diplomon de la Universitato Qingdao.

La naskiĝo de la televida filmo grandparte ŝuldiĝas al la forta subteno de la urbestro de Qingdao, kaj al fervora kunlaboro inter Ĉina Esperanto-Ligo kaj Radio Pekino. Konsilantoj de la filmo estis s-roj Chen Yuan, prezidanto de ĈEL, kaj Yosimi Umeda, eksvicprezidanto de UEA. La scenaron verkis s-roj Laŭlum kaj He Yulin. Dum

Nova etapo en Hungario

La ĉeso de la deviga instruado de la rusa lingvo en Hungario donas al Esperanto novan ŝancon. Komencas frukti la plurjardeka agado de esperantistoj sur la tereno de instruado.

La vojo kompreneble estis nek glata nek rekta. Antaŭ 25 jaroj la esperantistoj atingis samrajtecon por Esperanto antaŭ la Ŝtata Lingvoekzamena Komisiono. De tiu tempo entute pli ol 1000 personoj trapasis la ŝtatan lingvoekzamenon. Pluraj el la ekzamenitoj jam ricevas kromsalajron pro sia scio de Esperanto. Estas interese, ke Hungara Esperanto-Asocio dum 20 jaroj paralele funkciigis sian propran ekzamenan sistemon, kaj nur de 1986 konsideras la ŝtatan sistemon laŭmerite.

La dua grava atingo okazis en 1966, kiam ekfunkciis la Esperanto-fako en la Teknika Universitato Eötvös. Dum sia dudekjara ekzisto tiu fako produktis 100 altnivele instruitajn esperantistojn, kapablajn labori kreive en Esperantio kaj ankaŭ mem instrui la lingvon.

En la lasta jardeko, la insista premo de esperantistoj al la eduka ministerio rezultigis plurajn tre gravajn paŝojn al la samrajtigo de Esperanto kun aliaj lingvoj. La dekreto 104/1980 de Ministro pri Klerigado ebligis elekti Esperanton kiel duan lingvon en bazlernejoj. Por mezlernejoj validas simil-

senca dekreto 123/1981. Fine venis dekreto 13/1985, laŭ kiu oni povas elekti Esperanton en ĉiuj altlernejoj kaj universitatoj. Verdire, kiam la rusa lingvo estis deviga tio ne tre helpis, sed nun malfermiĝas nova perspektivo antaŭ Esperanto en Hungario.

La malnova revo de la esperantistoj realiĝas. Esperanto eniras en la reproduktoprocezon de la socio. En nia kazo, esperantistaj organizaĵoj jam ne plu devas zorgi pri la lernolibroj, pri la trejnado de instruistoj, nek pri la varbado de lernantoj. La proceduro okazas laŭ la reguloj de la socio, same kiel ĉe la aliaj studobjektoj.

Tiu kvaronjarcenta sperto donas minimume du konkludojn:

- unue ni devas atingi la samrajtecon de Esperanto ĉe la ŝtata ekzamen-sistemo (tio devigas neniun instancon al io ajn);

- nek Esperanto, nek aliaj lingvoj povas esti devige instruataj, sed Esperanto en la konkurado kun aliaj lingvoj povas okupi sian lokon en la hierarkio;

- la plimulto de la interesiĝantoj pri Esperanto ŝatus uzi ĝin jam nun, taksante ĝin kiel praktikan ilon de komunikado inter diverslingvanoj. Pro tio la elekto de Esperanto grave dependas de la demonstrebla uzebleco de la lingvo.

Oszkár Princz (Hungario)

Regiona agado:

De la deka lingvo ĝis la dua

Pasintjare ni lanĉis la projekton "Komunikado en la Eŭropa Komunumo". Ĉe la Universala Kongreso en Brajtono ĝi estis preparolata en du kunvenoj. De tiam la projekto estas reviziita lau la ricevitaĵaj reagoj.

Enkadrigi Esperanton en la lingvo-politikon

La 12 membro-ŝtatoj de Eŭropa Komunumo havas naŭ oficialajn lingvojn kaj plurajn regionajn lingvojn. Survoje al la kreo de komuna merkato por varoj kaj servoj, la komunika bezono daŭre kreskas, same kiel la

Televida elsendo en ĉiuj EK-ŝtatoj samtempe, dediĉita al la lingvo-problemo en EK kaj la ebloj solvi ĝin;

Novaj eksperimentoj pri la propedeŭtika valoro de Esperanto;

Eŭropa Junulara Parlamento konsistanta el Esperanto-parolantoj el ĉiuj EK-ŝtatoj, kiu diskutu unu aŭ plurajn aktualajn temojn;

Naciaj aŭ internaciaj konferencoj en ĉiuj membroŝtatoj, uzantaj la loka(j)n lingvo(j)n, pri la propedeŭtika valoro de Esperanto;

Progresigo de la ĝemelagado de urboj, komunumoj k.s.

Frank (FR Germanio), Broccatelli kaj Chiti-Batelli (Italio), Piron (Svislando), Duc Goninaz (Francio), Nuñez (Hispanio), plus la membroj de la kerngrupo.

Due, oni pretigas dokumenton pri la tuta projekto. Ĝi konsistos el tri partoj: priskribo de la projekto mem, prezento de la lingvoproblemo kaj la propedeŭtika valoro de Esperanto, kaj pritrakto de la ekonomia flanko de la lingvoproblemo. Ni intencas aperigi la tri partojn ne nur kune, sed ankaŭ en tri apartaj broŝuroj. La tuto nepre estu tradukita en ĉiujn oficialajn kaj regionajn lingvojn de EK: por tio ni petas la helpon de la landaj asocioj. La dokumento estos uzata unuavice por informi la partoprenantojn en la aŭskultaj kunsidoj, kaj krome povos servi



Koktela varbado:
La provoj restarigi Eŭropan Parlamentan Esperanto-Grupon en Bruselo kvazaŭ komplementas la premtaktikon de Erasmus kaj liaj kolegoj.

tiucelaj elspezoj. La lingvo-politiko de EK nun emfazas la neceson lerni pli el la oficialaj lingvoj de la Komunumo.

Esperanto povas grave kontribui al la komunikado en EK. Diversaj instru-eksperimentoj pruvis, ke la junaĝa lernado de Esperanto plifaciligas la lernadon de aliaj lingvoj (la t.n. "propedeŭtika valoro" de Esperanto). Pro tio la lernado de Esperanto estus bona enkonduko al la lernado de la oficialaj ŝtataj lingvoj. Ĝenerale, Esperanto povus roli kiel dua kaj neŭtrala lingvo apud la oficialaj kaj regionaj lingvoj.

Por atingi tiun celon ni entreprenos samtempe en la 12 membro-ŝtatoj identajn aŭ samspecajn agadojn. Nepre necesa estas la kunlaboro laŭ komuna strategio de la E-asocioj en EK.

Inter la aktivaĵoj, kiujn indus entrepreni laŭ ebleco, troviĝas ekzemple:

La nuna stato

En la Brajtona UK la projekto ricevis sufiĉe grandan apogon. Kerngrupo, konsistanta el Hans Erasmus (Nederlando), Edward Symoens kaj Grégoire Maertens (Belgio), poste ellaboris programon surbaze de la interkonsento pri la farota laboro. La unua prioritato de la kerngrupo estis kunmeti delegacion, kiu iam en 1990 dum kelkaj sinsekvaj tagoj ĉeestu aŭskultajn kunsidojn de Eŭropa Parlamento kaj Eŭropa Konsilio pri la lingvoproblemo en Eŭropo, precipe en EK. Ni pristudas la eblecon kune kun aliaj interesitoj aranĝi aŭskultan kunsidon de la Komisiono de EK. Eventuale ni povas organizi ankaŭ en la membroŝtatoj kunsidojn kun spertuloj pri instruado.

La delegacio konsistas el: Wells (Britio), Tonkin (Usono), Lins kaj

kiel taŭga informilo ĉe naciaj kaj internaciaj kongresoj. Ni antaŭvidas ke la Esperanta teksto estos preta post kelkaj monatoj.

Engaĝi ĉiujn asociojn

La landaj asocioj, krom engaĝiĝi pri la tradukado, organizado de konferencoj k.s., estos petataj inviti gravajn personojn membriĝi en Patrona Komitato. En Nederlando jam akceptis la inviton prof. d-ro Jan Tinbergen, nobelpremiito pri ekonomio.

Fine, estas necese ke ĉiuj Esperanto-organizaĵoj aliru laŭeble aliajn organizaĵojn, atentigante ilin pri la lingvoproblemo kaj ĉio rilata al ĝi. Gravaj estas ekzemple la Eŭropa Movado kaj la diversaj asocioj pri instruado kaj edukado.

Hans Erasmus (Nederlando)

Konservi la entuziasmon

Antaŭ proksimume dek kvin jaroj, la strategio de multaj entreprenoj komencis ege ŝanĝiĝi. Ĝis 1975 la okcidentaj komercistoj pensis precipe pri pli da produktaĵoj kaj novaj merkatoj. Perdi klientojn ne tiom gravis, se oni povis aldoni pli da novaj. Sed de tiam la emfazo iom post iom ŝanĝiĝis sub la premo de novaj cirkonstancoj en la monda komerco. La atento nun ne plu estas por la produkto, sed por la kliento. Specialistoj kalkulis, ke la konservo de kontentaj klientoj estas multe malpli kosta, ol la varbado de novaj por anstataŭi malkontentulojn.

La varbado de novaj aktivuloj por kompensi la malaperon de seniluziigoj estas unu el la ĉefaj problemoj en la Esperanto-movado. Novuloj komencas ĝenerale plej entuziasme kaj pretas dediĉi tempon, energion kaj monon al la movado. Post kelkaj monatoj aŭ jaroj tio plej ofte malaperas. Tio signifas, ke ni perdas grandiozan kapitalon. Pli valore ol daŭre varbi estas vivteni la entuziasmon de jam varbitoj. Ĉu ni do povas lerni ion el la spertoj de la entreprenistoj?

Streĉo kaj malstreĉo

En la vivo oni povas malkovri multe da ciklaj procezoj, kiuj senĉese revenas, kiel ekz. vintro kaj somero, varmo kaj malvarmo, lumo kaj mallumo, enspiro kaj elspiro, streĉo kaj malstreĉo... La harmonia fluo plaĉas al ni, la rompo de tiu ciklo malplaĉas. Ni do ŝajne bezonas la alternon de streĉoj kaj malstreĉoj. Enspiro bezonas streĉon, elspiro kaŭzas malstreĉiĝon. Ni ja devas elspiri por paroli kaj vi facile povas dedukti, ke la esprimo de impresoj estas malstreĉa dum aŭskulti estas streĉe. Rilato kun bona amiko estas tiel plaĉa, ĉar spontanee estiĝas alterno inter atenta aŭskultado kaj eligo de sia sincera opinio. Kontraŭe al tio, laborsituacio, kie dungito devas absorbi multajn impresojn sed ne kuraĝas aŭ rajtas eligi siajn verajn ideojn kondukas al trostreĉiteco, malkuraĝiĝo kaj malmotiviĝo. Tiam la rilato fariĝas malagrabla.

Pli fia estas la ignorado. Se forestas stimuloj, niaj sentoj atrofiĝas. Dungito, kiun oni iomete forgesas, kiu ricevas nek laŭdojn, nek riproĉojn,

fariĝas apatia, malkapabla. Tial ni tiom grave taksas la regulajn rilatojn inter la aktivuloj, la oficistoj de la centra oficejo kaj mi. La revuo por aktivuloj pri informado, *Influo*, estas provo vivteni la konversacion. Ni ankaŭ esperas, ke pli kaj pli da aktivuloj ekrilatos inter si. Nur tiel ni povas konservi la entuziasmon, tikli la senenergiajn kaj permesi malstreĉiĝon al trostreĉitaj kunlaborantoj.

Flegi eksteran simpatian

Ni povas ankaŭ fari kelkajn utilajn konkludojn por niaj rilatoj kun i.a. ĵurnalistoj. Ni povas influi la kontaktojn, tiel ke ili estu plaĉaj: mem disponi pri kiom eble plej multe da utilaj informoj, sed ne bombardi la homojn per tiuj informoj. Gravegas bone aŭskulti la demandojn kaj liveri rektan, sinceran respondon. Kompreneble oni rajtas ja iom beligi nian situacion, sed oni ne nepre kaŝu la proprajn problemojn kaj mankojn. Respondoj estu koncizaj. Ni atentu pri la korpaj signaloj: interesita, rigardanta la horloĝon, senpacienca... Se efektive sentiĝas iu persona simpatio kun ĵurnalisto, tiam oni nepre flegu ĉi tiun kapitalon. Disponigi duonan tagon aŭ vesperon kaj pagi bonan manĝon povas esti plej valoraj investoj. Ne forgesu fari noticojn pri ĉiu ĵurnalisto kun kiu vi havis bonan rilaton, pri ties interesiĝoj, promesoj, rilatoj kun aliaj komunikiloj, pri personaj aferoj kiel ŝia/lia ŝatokupo, eksterlandaj vojaĝoj, privata adreso ktp. Persona rilato permesas al vi akiri valorajn informojn pri la ĝusta momento por havigi informojn: eluzi periodon de novaĵa vakuo kaj eviti kolizion kun troa informfluo.

Kaj fine pripensu, ke eĉ plej bona rilato bezonas regulan revivigon sed ankaŭ ne troan. Mi memoras, ke mi iam instigis amikon ĉiusemajne sendi iun komunikon. La rezulto estis priplorinde malbona: en la komenco aperis fojfoje io, finfine nenio plu. Sed kelkfoje en la jaro ni certe rajtas aŭdigi nin, kondiĉe ke ni havas novaĵon! Ĉirilate mi konsilas kombinon de skriba kaj telefona kontakto.

Ivo Durwael


Estrarano pri Informado

Librofoiroj:

E-libroj allogas en Havano

De la 6-a ĝis la 12-a de februaro ĉi-jare ariĝis en la kuba ĉefurbo eldonistoj, verkistoj kaj librokomercaj fakuloj el 40 landoj kaj 4 internaciaj organizaĵoj por la 4-a Internacia Librofoiro Havano '90.

Partoprenis la foiron entute 500 eldonejoj, kaj inter la 45 naciaj eksponantoj troviĝis ankaŭ Kuba Esperanto-Asocio (KEA). Jam la duan fojon KEA havas sian propran budon en tiu ĉi librofestivalo. Ĉi-foje, la juna kuba asocio sukcesis prezenti al la vizitantoj pli ol naŭdek librojn kaj plurajn revuojn kaj gazetojn, kiuj specimene bildigis la nuntempan E-literaturon originalan kaj tradukan.



Inter la plej atentokaptaj allogaĵoj ni menciis la rakontojn el *La ora aĝo* de José Martí, ĵus aperigitajn de la samnoma nacia eldonejo, la kolekton de riĉe ilustritaj ĉinaj infanlibroj (cetere ankaŭ troveblan en la ĉina stando), *Aŭstralia Antologio* kaj la ĉiam freŝan *La Eta Princo*.

Laŭ oficialaj statistikoj, pli ol 80 000 personoj vizitis la ekspoziciejon apud la havana Kongresa Palaco, venont-julia sidejo de la 75-a Universala

Kongreso de Esperanto. Verŝajne tiom multaj atingis nian kioskon, tiel ke tre bone povis efiki la montrado de la bildbendo *Esperanto* de Roman Dobrzyński, antaŭ monato subtitolita de la Kuba Televido, disdono de naci-lingva informfolio kaj eĉ vendado de la fama lernolibro *Sabe Ud. Esperanto?* de Jorge Hess.

Jurnalistoj kaj aliaj publicistoj vizitadis la E-budon, kaj ĝenerale montris grandan scivolemon pri la libroj kaj pri la preparlaboroj por la baldaŭa UK en Havano. La deĵorantoj klopodis respondi ĉies demandojn, malgraŭ tio ke fojfoje alvenis homoj provokeme angloamaj, kiuj elprovis la argu-

La kongreso en Havano promesas viciĝi inter la plej sukcesaj el la informa vidpunkto. Preskaŭ ĉiuj kubanoj aŭdos almenaŭ unufoje pri Esperanto.



mentojn kaj paciencon de la esperantistoj-eksponantoj.

Tamen ĉio feliĉe finiĝis kaj ree evidentiĝis la fakto, ke ni tute ne povas preteratenti tiuspecajn renkontiĝojn de personoj engaĝitaj en internaciskala kultura agado, ĉar ili plejofte pretas atenti, kaj plej grave, eventuale diskonigi la klopodojn kaj atingojn de Esperanto cele al pli fruktodona interhoma komunikigo.

Orlando Raola González (Kubo)

Libroservo:

Flugi kiel Kajto

Kiel kutime en aprilo, ni prezentas la vendostatistikon de la Libroservo de UEA el la antaŭa jaro. La unua listo montras la librojn venditajn unuope, t.e. rekte al probabla legonto. La dua listo inkluzivas kvantajn vendojn al aliaj libroservoj, kaj pri ili ne eblas kontroli, ĉu ili atingis legantojn ankoraŭ dum 1989 aŭ ne.

La du pintaj titoloj el 1988 restas ankoraŭ ĉe la supro: la fama lernolibro de Audrey Childs-Mee kaj la rimarkinda studo de Lins. PIV kaj PAG tenas siajn tradiciajn lokojn, kaj *Esperanta bildvortaro*, *Jubileo*, kaj la bazaj esperantologiaj verkoj de Auld, Janton kaj Wells montras daŭran allogon.

Pluraj klasikaĵoj de Stafeto reprenis honorindan lokon en la merkato: *Aventuroj de pioniro* (kie eventuale rolis la Jaro de Privat), la Zamenhof-biografio de Boulton, kaj kompreneble la bela eldono de la Proverbaro. Ke la movado tamen pretas aĉeti kelkajn beletrajn distraĵojn montras la disvendo de la "maldeca epizodaro"

de Beaucaire, dum pluraj aliaj Beletraj Kajeroj okupas lokojn tuj post la 20-a en la kvantaj vendoj.

Sed plej surpriza kaj eĉ unika en la pasintjara listo estas la sukceso de la nederlanda muzikgrupo Kajto. Ĝia kasedo ne nur atingis la kvaran lokon en la unuopaj vendoj, sed ankaŭ la 22-an entute, dum la 24-an ricevis ĝia kompakta disko. Sendube kontribuis la koncertoj ĉe la UK-oj en Roterdamo kaj Brajtono, kaj ankaŭ la fakto, ke la Libroservo de UEA troviĝas en Nederlando. Tamen, plej grave, la grupo plenigis per sia vigla stilo kaj originala materialo senteban mankon en nia muzika kulturo.

Ĉi tiuj listoj ne povas precize speguli la ŝatojn de la movado kiel tuto. UEA eldonis aŭ elaĉetis 12 el la verkoj en la unua listo kaj 14 el la dua, kio grave influis la rezulton. Sed se oni kompilis la rezultojn ankaŭ el la aliaj movadaj libroservoj (eble foje provinde), tie oni nepre trovus almenaŭ duonon de la ĉi-paĝaj titoloj.


mf

UNUOPAJ VENDOJ 1989

1. La danĝera lingvo (Lins)
2. La fenomeno Esperanto (Auld)
3. Plena ilustrita vortaro (red. Waringhien)
4. Kasedo "Kajto"
5. Katalogo de Esperantaj poŝtmarkoj
6. PIV-suplemento
7. Plena analiza gramatiko (Kalocsay/Waringhien)
8. Esperanta bildvortaro (red. Eichholz)
9. Laŭdo de l' stulteco (Erasmus)
10. Lingvistikaj aspektoj de E-o (Wells)
11. Esperanto: lingvo, literaturo, movado (Janton)
12. Jubileo (red. Fettes)
13. Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI
14. La bona lingvo (Piron)
15. Lingvo kaj vivo (Waringhien)
16. Kompakta disko "Kajto"
17. Nepivaj vortoj (komp. Cherpillod)
18. Proverbaro esperanta (Zamenhof)
19. Faktoj kaj fantazioj (Boulton)
20. Esperanta antologio (red. Auld)

ENTUTAJ VENDOJ 1989

1. Saluton! (Childs-Mee)
2. La danĝera lingvo (Lins)
3. Aventuroj de pioniro (Privat)
4. Gerda malaperis! (Piron)
5. Esperanta bildvortaro (red. Eichholz)
6. La fenomeno Esperanto (Auld)
7. Esperanto: lingvo, literaturo, movado (Janton)
8. Zamenhof, aŭtoro de Esperanto (Boulton)
9. Plena analiza gramatiko (Kalocsay/Waringhien)
10. Faktoj kaj fantazioj (Boulton)
11. Proverbaro esperanta (Zamenhof)
12. El la vivo de bervalo sentaŭgulo (Beaucaire)
13. Lingvistikaj aspektoj de E-o (Wells)
14. Dictionnaire de poche
15. Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo (Sekelj)
16. Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI
17. Diccionario de bolsillo
18. Jubileo (red. Fettes)
19. Lingvo kaj vivo (Waringhien)
20. Esperanto and English Dictionary (Wells)



Taglibroj de la nova kaj malnova mondoj

Adolesko. Blazio Vaha. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 243p. 21cm. 18,00 gld.

Sed nur fragmento. Trevor Steele. Chapecó: Fonto, 1987. 448p. 22cm. Bind. 48,00 gld.

La Esperanta romanarto trairis kosman evoluon en la okdekaj jaroj. Fruaj kvalitaj kometoj, kiel *La litomiŝla tombejo* kaj *Ombro sur interna pejzaĝo*, montriĝis heroldoj de kvanta supernovao, kiu en 1987-88 lanĉis dek kvinon da novaj steloj. Jen du el la plej brilaj: hungaro kaj aŭstraliano, ligitaj per la elekto de plej malfacila tereno por sia debuto. Se en krimromano gravas la intrigo, en psikologia romano la karakteroj, en ideromano la originaleco – en la historia romano oni bezonas kunplekti ĉiujn tri, rekreante la apartaĵojn de difinitaj tempo kaj loko por legantaro, kiu plejparte konas nek tiun nek tiun ĉi. Tasko multoble malpli facila, fronte al la Esperanta diasporo.

Mi tamen kovas dubon, ĉu la aŭtoro de *Adolesko* vere verkis por nehungara legantaro. La libro modernisme skizas la unuajn dudekelkajn jarojn en la vivo de Jozefo, ano de Miloĝio, naskita unu jaron post la Kvinjara Milito: sen ajna dubo, jen spegurbildo de Hungario en la 50-aj kaj 60-aj jaroj. Sed la leĝojn de la spegulo konus hungaro, kiu malantaŭ la fantaziaj nomoj kaj kaprica rigardo de infano palpsentus ion proksiman kaj konkretan. Eksterlandano preterstumblas la detalojn en mallumo.

Eĉ tia stumblanto povas tamen aprezi multon. Brile transsentiĝas la konfuziĝo de infano, kiu akceptas laŭvorte la asertojn de ĉirkaŭaj plenkreskuloj. Dum Jozefo plu kreskas, la konscienca senkompato de lia biografianto malkaŝas ĉiun plej etan honton en lia animo, ĉiun grizan grajnon de angoro. Tiaj ja multas. Edukita inter la betonaj certecoj de kristanismo kaj komunismo, Jozefo ekspertas, verkomeze, la erozian forton de la racio. Deproksime ni atestas la diseriĝon. Kvazaŭ eksperimenta

fotisto, kiu serĉas taŭgan perspektivon, Vaha eternigas jen taglibran fragmenton, jen dentogrinco mallertan poemon, jen kritikan komenton de iu konato – aŭ de pli aĝa Jozefo, kiu sardone rigardas sian iaman memon. Ne mankas humuro, aŭ pli ĝuste iu Baghy-eska grimaco pri la homa stulto. En tiaj detaloj la mezeŭropeco konstante subsenteblas.



Etoson tute alian ni trovas en la aŭstralia *Sed nur fragmento*. Per bildoj hele klaraj kiel la Pacifika aero, Steele rekreas la socion de 19a-jarcenta Brisbano kaj la apenaŭ tuŝitan kulturon de la insulo Novgvineo tra la okuloj de rusa antropologo Barono Maklin. Sed tiu bunta fono estas nur scenejo. La kerno de *Sed nur fragmento*, same kiel de la hungara libro, koncernas la erozion de mondokredo. Maklin fervore dediĉis sin al kunkonstruo de la "Granda Mozaiko", universala registro de objektiva, empiria scio, kiu ebligas kompreni la mondon. Sed lia materiismo ne povas elteni la defion, kiun lanĉas sperto inter la indiĝenoj de la Verda Insulo. Kiel la adoleska

Jozefo, tiel la adolta Maklin serĉas tra la ceteraj paĝoj la perditan "praŭdon" (*Adolesko*: ideologia certeco) – en laboro, en amo, en politiko, ĉiuj flue skizitaj de lerta plumo, kiu foje tremas sin en satira humuro. Cetere, ankaŭ tiu serĉo kondukas nin tra la paĝoj de taglibro.

Inter la du libroj troviĝas tamen la tuta terdiametro. Dubo ne indiĝenas en la pionira etoso de Suda Pacifiko: la skeptiko de Maklin trovas respondon en nova kosmologio kaj idealigita amo, kaj ne longe poste la fadenoj de la intrigo elnodiĝas en ne nepre feliĉan sed kontentigan finon. Tia klareco estas esence fremda al *Adolesko*. Sangaj jarcentoj apartigas Hungarion de la antipoda Nova Mondo; la sola ebla optimisma fino, en Eŭropo de la malfrua dudeka jarcento, estas nefermo de la parentezoj. Kaj jen la stilo de Vaha saldiĝas pozitive. La miksitaj periodoj kaj aŭtoraj voĉoj, la jam notita fantazio, plus iugrada malstabilo en la nomoj kaj datoj kunlaboras por lasi Jozefon pendi, sojle de la matura vivo, en libera nedifiniteco.

Se distron vi celas, elektu prefere la aŭstralian verkon, multe pli facile legeblan kaj pli bele eldonitan. En la taglibroj de Jozefo vi trovos anstataŭe defion, kunlabori mem en verkado de la romano. Se vi laciĝos pri kribrado de hazardaj notoj kaj kapricaj detaloj, tamen restos al vi la dorskovrila form-poemo. Sur unu paĝo ĝi resumas la esencon de la tuto.

Mark Fettes (Nederlando)



Rifuzo preskaŭ aŭtomata?

Mariagnes. Lorjak (ps.). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1986. 220p. 20cm. ISBN 963-571-168-9. 21,00 gld.

Vivi estas danĝere. István Nemere. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1988. 159p. 20cm. 21,00 gld.

Esperanto nun aĝas pli ol cent jarojn, kaj proksimume centjara estas ankaŭ nia literaturo. Delonge, do, forpasis la tempo kiam oni bezonis saluti ĉiun libron kun granda Hura!. Nia lingvo estas sufiĉe matura, kaj nia literaturo sufiĉe longhistoria, ke ni havas devon kritiki ĉiun novan libron laŭ la samaj kriterioj, laŭ kiuj ni taksas novan verkon en ĉiu el la aliaj gravaj lingvoj.

Se *Mariagnes* aperus en sia aktuala formo en iu ajn el la gravaj naciaj lingvoj, la plej multaj gazetoj rifuzus recenzi ĝin pro ĝia amatoreco ĉiurilata.

Pri la teknikaj aspektoj (kompostaj, lingvaj) mi parolos mallonge poste. Sed unue, literatura takso:

Unue, mi agnosku ke la romano certgrade distras, kvankam se mi ne devus verki recenzon pri ĝi, mi ne certas ke mi finlegus ĝin. La temo estas banala, kvankam eksperta romanisto eble kapablus kaŝi tion de la leganto. Tiel eksperta Lorjak ne estas. Franco, edzo kaj patro, estas membro de kantgrupo, kie li renkontas mondkonatan eksfilmaktorinon. Post diversaj sekretaj amoraventuroj la afero malsekretiĝas, okazas enfamilia kaoso, kaj persono kiu neniam legis detektivromanon eble sukcesus ne antaŭscii la "surprizegan" kulminon de la intrigo. Mi ne rajtas "malkovri" (unu el la du plej amataj vortoj de Lorjak) al vi la kulminon, nur diri ke ĝi bone imitas la stilon de romano de Agatha Christie. "Apriore" (la alia plej amata vorto de Lorjak) mi deziras diri nur, ke ĝi estas tamen multe malpli verŝajna. (Jes, vi pravas, ke mi – imite al Lorjak – ĵus grave misuzis la vorton "apriore".)

Memoroj pri io bela

Sub cirkotendo. Stan Bubenîc (1904-1979). Hago: Internacia Esperanto-Instituto, 1988. 195p. 21cm. 27,00 gld.

La cirkoarto, por esti komprenata, ne postulas de la publiko iun ajn lingvon. Tial ĝi estas inter la plej internaciaj el ĉiuj artoj. En la pasinteco la homoj ofte konsideris la cirkoarton kiel ion nenaturan, kiel ion misteran, kaj apartaj cirkanoj aŭ eĉ tutaj trupoj de aktoroj estis persekutataj, pro tio ke ili praktikis ion malklaran por la homoj. Nun la cirkoarto okupas gravan lokon en la kultura vivo de multaj popoloj. Preskaŭ ĉiu homo en sia infanaĝo revis estiĝi artisto en cirko, kvankam nur tiuj, kiuj kontaktas cirkanojn aŭ legas pri ili, ricevas impreson pri ties vivo.

En la naciaj literaturoj, same kiel en Esperanto, oni malofte havas okazon legi pri la cirkoarto. *Sub cirkotendo* estas eble la unua tiuspeca libro en la Esperanta literaturo. En ĝi la aŭtoro rakontas pri la vivo en iu ĉefa cirko antaŭ trideko da jaroj. La libro mem ne pretendas, ke ĝi prezentas la vivon en ĉiuj cirkoj kaj en ĉiuj tempoj – prave, ĉar la vivo en ĉiu cirko estas

malsama kiel la homoj mem. Mi mem dum kelkaj jaroj laboris sub cirkotendo, kaj la libro, kvankam sen spuro de klasikeco, memorigas min pri io bela, pri io mia.

Tamen Stan Bubenîc laŭ mi ne tute bone konas la vivon de la migrantaj aktoroj. Nur kiam li ne plu povis praktiki sian laboron kiel juristo, li fariĝis cirka muzikisto; kaj kvankam en la cirko ĉiuj – la artistoj, muzikistoj, reĝisoroj – estas unu tuto, la aŭtoro faras ian diferencon inter la muzikistoj kaj la aliaj. Li ne priskribas multajn programerojn, la talenton de la artistoj, ilian amon kaj sindonemon al la cirko. Li fakte tute ne tuŝas la temon de la cirko kiel arto, kvazaŭ ĝi estas fremda al li. Mi bedaŭras ankaŭ la nemencion de la nomoj de la urboj, kiujn vizitis lia cirko, ĉar tio certe vekus memorojn ĉe iuj legantoj.

Sed liaj rakontoj portas ĝuon por tiuj, kiuj amas la cirkoarton. La herooj de Stan Bubenîc estas homoj el karno kaj sango, kaj iliaj travivaĵoj estas interesaj. Lia lingvaĵo estas lerta kaj komprenebla, kaj preseraroj preskaŭ tute mankas. Nur la cirkan vortareton en la fino de la libro mi ne tute aprobas. Nur malgranda parto de la vortoj estas uzata internacie, kaj la ceterajn oni uzas nur en ĉefaj cirkoj.

Georgi Marinov Mihajlov (Bulgario)

Lorjak plej bone verkas, kiam ŝ/li priskribas seneventajn scenojn. La dialogo tro ofte estas serio da monologoj, kaj la priskribo de eventoj estas tiel mallonga kaj malverŝajna ke la leganto miras. Enestas ĉio, kion postulas populara romano, nur mankas originaleco kaj verktalento.

La (ŝajne perkomputila) kompostado estas tiel plena de eraroj, ke ofte la senco estas malfacile divenebla. Tre bedaŭrige, kulmina sceno kiu devus esti sur paĝo 161 anstataŭiĝis per ripeto de teksto jam aperinta sur paĝo 145, tiel ke la leganto devas konstrui por si mem propran imagon pri kio okazas. Pro la abundego de komposteraroj, povas esti ke pri kelkaj man-

*"Enestas ĉio,
kion postulas
populara romano,
nur mankas originaleco
kaj verktalento."*

kantaj akuzativoj, intermiksiĝo de adverboj kaj adjektivoj, kaj misuzo de "si" ne kulpas la aŭtoro.

Ankaŭ *Vivi estas danĝere* ne havas pretendon al literatura valoro. Ĝi tamen estas interesa libro kun bone preparita intrigo. Temas pri konspiro: Militkrimulo, retrovita pro diversaj kialoj en antila insula nacio, estas reportenda al Francio por sensacia proceso. Tiel, almenaŭ, kredas la heroo de la romano, kies tasko estas trovi areton da kunlaborantoj kaj sekrete liveri la militkrimulon al la prokuroro en Parizo. Relative simpla intrigo, al kiu la aŭtoro saĝe limigas sin.

La verkado estas amatora. Fininte la legon mi volis diri al la verkinto: "Vi havas iom da talento, estus bone se vi partoprenus kelkajn kursojn pri romanverkado. Nenio povas doni al vi la talenton de Graham Greene aŭ de Ferenc Szilágyi (*Mistero minora*), sed via malatento al detaloj, via verka kaj lingva stilo multe profitus de tiaj kursoj." Kvankam la amatoreco kelkmaniere seniluziigas la leganton, ĝi paradokse ankaŭ donas iom da freŝa

aero al tiu ĝenro. Eble la pago de nur cent mil francaj frankoj al la konspirantoj ŝajnas en la hungara ekonomio monsumego? Aliflanke, la aŭtoro memoras la realismajn detalojn de vivo, ke oni ja devas manĝi, urini kc., kion grandparte ignoras la profesiaj verkistoj.

Plej grava estas tio, ke la diversaj karakteroj en la romano neniam fariĝas vivantaj personoj. Post nemultaj paĝoj le leganto ne plu provas memori kion faras kiu, la ses konspirantoj estas nur karbonkopioj unuj de la aliaj. Nemere lasas al la intrigo interesi la legantojn, kaj tion ĝi bone faras.

Komposteraroj estas neabundaj sed tre ĝenaj, kaj Nemere nepre devus kontroli la lingvouzon en siaj libroj antaŭ ol eldonigi ilin. Por nacilingvaj verkoj la tekston kutime redaktas eldonistoj. Ĉu niaj eldonistoj timas editori? Aŭ ĉu ili mem ne kompetentas lingve? Nemere faras multajn erarojn (speciale ĝenas la uzado de *ĝis* en la senco de *dum*), nepardoneblajn en publike eldonita libro. La libro mem estas bonaspekta, sed la paĝoj tuj elfalas, tiel malforta kaj avare uzita estas la gluo kuntenanta ilin.

Malgraŭ miaj grumbloj, mi ĝuis la libron – sed se oni proponus egal-kvalitan verkon al angla aŭ franca eldonisto, rifuzo estus preskaŭ aŭtomata.

Donald Broadribb (Aŭstralio)

Feliĉaj finoj, de sia speco

Kromosomoj. Lorjak (ps.). Antwerpen: Flandra Esperanto-Ligo, 1989. 153p. 21cm. Serio "Stafeto", n-ro 10. 15,00 gld.

Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas. Manjo Austin. Antwerpen: Flandra Esperanto-Ligo, 1988. 128p. 21cm. Serio "Stafeto", n-ro 6. 18,00 gld.

Post kvardekjara gekunvivado Bernard Dubosk kaj Mirela Sidoret fine decidas geedziĝi. Dum la ceremonio Mirela hazarde ekscias, ke la originala familia nomo de ŝia edzo estas Landru, kaj ke li estas la filo de la fifama amasmurdinto de virinoj. Timante, ke Bernard povus esti heredinta iujn dispoziciojn al murdemo, ŝi kaj Bernard entreprenas diversajn esplorojn kun alterne pozitivaj kaj negativaj rezultoj, ĝis ili ekscias, ke ĉiu timo estas superflua, pro... *deus ex machina!*

Do grandega "hepiendo" (feliĉa fino: mi pardonpetas pro la krudega pseŭdoneologismaĉo!). Antaŭ ol ĝi venas, Lorjak lerte enplektas surprizajn, foje humurajn aŭ eĉ groteskajn, foje detektivecajn kaj aventurajn epizodojn. La rezulto estas sprite amuza verko, da kiaj nia literaturo bezonas pli multe.

Speciale atentinda estas la lingvaĵo de la libro: ĝi estas bunta, riĉa je novaj formoj. Lorjak ne kreas neologismojn, ne, li simple "lorjakumas" – nove kombinas la fundamentajn elementojn de la lingvo por krei formojn pli precizajn, pli signifoplenajn. Lia piediranto ne paŝas sed *paŝaras*, liaj herooj *ĉevivas* la aferon, *ideas* pri io; li uzas formojn kiel: reankaŭ, niahejme, ceteruloj, maledziĝoj, nuptularo... Tamen, iuj esprimoj estas tro nekutimaj, ekz. "komposti (telefon)numeron", "sagi al ŝi nigran okultrafon", kaj kelkaj aspektas kvazaŭ laŭvorte tradukitaj el la franca. Iom ĝenas la relative ofta pozicio de la atributo post ĝia substantivo, precipe ĉe la frazfino, kaj la fojfoja superflua uzo de kondicionalo.

Sed precipe la iom analizema lingvouzanto ĝuos la fantaziriĉajn vortkonstruon kaj frazeologion de Lorjak, do, legante ĝuos duoble.

La romano de Manjo Austin estas iu tute alia: provinca kaj familia romano, pentranta la vivon en irlanda provinco de antaŭ kelkaj jardekoj. La historio estas simpla: Vidviniĝinte, Nora Linehan, restinta sola kun 20-jara filo Jack kaj 17-jara filino Maureen, reedziniĝas al Joe O'Neill, vidvo kun kvar infanoj 12- ĝis 20-jaraj. Nora kun la siaj transloĝiĝas al Joe, en provincan urbeton. Ekestas granda familio, kies unuopaj membroj serĉas kaj trovas pozitivan rilaton unuj al la aliaj, Nora

Ne magio sed mistifiko

Nigra magio. Deck Dorval kaj Christian Declerck. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1988. 216p. 21cm. Serio "Stafeto", n-ro 7. 28,20 gld.

Nigra magio estas stranga libro. Unue, Flandra Esperanto-Ligo mistifikas aĉetuntojn, prezentante siajn eldonaĵojn sub la, por ni ĉiuj jam sankta, marko "Stafeto". Aldone, interna kovrilpaĝo disigas la kun-aŭtorojn per la indiko: "lingve reverkita de Christian Declerck laŭ la originalo de Derk Dorval". Mi do dispriskribos iliajn rolojn.

Ni komencu per Dorvalo. Decidinte verki krimromanon kie ĉefrolu policisto Ksaverio Kant (samkiel en du romanoj pli frue aperintaj), li elektis tro klasikan, nun eksmodan modelon: tiun, kiun plej famigis kaj disvastigis

Agatha Christie. Unuapaĝa listo de personoj, unuaĉapitra poprezento de ili, duaĉapitra murdo (aŭ similaĵo), serĉado de spuroj kaj kulpintoj ĝis la praantaŭlasta, solvo en la antaŭlasta, kaj feliĉa fino kaj adiaŭo en deserta ĉapitreto. En *Nigra magio* mi trovis la intrigon tro neverŝajna, nelaste ĉar tute mankas tempindikoj. Cetere, kiom koncernas ĉion nigra magio?

Bedaŭrinde s-ro Deklerko, kiu devintus roli kiel ne pli ol lingva revizianto, deziris vesti senpretendan krimromanon per lingvaĵo, kiu al tiuspeca verko tute fremdas. Surkovrile li ne hontas aserti, ke ĝi "stile kaj lingve soras". Tiucele li salate kaj senkriterie eltiris kelkajn modaĵojn el lastatempaj neologismaj glosar(et)oj kaj miksis ilin kun la tradiciaj formoj: *pre* apud *antaŭ*, *men* apud *malpli*, *erst* apud *ne pli frue ol*, *mido* apud *tagmezo*...

Krome, apud uzeblaj parolaj frazoj kaj esprimoj ("ligi kaj logi", "rapid-rapida", "desupri", "baldegaŭ") li enkondukas bizarajn vortumojn, kiaj "malresti", "mi rajdis pneŭon lika", "tieleske 'stis", kaj amason da *-intis* tra la tuta libro, kiam sufiĉus *-is*. Fine, li montriĝas esti unu el tiuj, kiuj aldonas al la franca o-finaĵon kaj nomas tion plena Esperanta vortaro: *aŭtopsio*, *minuskula*, *arida*, *insinuo*... kie taŭgus nekropsio, liliputa, teda, sugesto... Ĝenas precipe la francisma uzo de vortoj: *terori* (hororigi), *averti* (voki), *freŝe* (friske), *inhali* (enspiri), *vehiklo* (veturilo), *afekcio* (tenero, amo), *rezervita* (silentema)... kio evidentigas supraĵan scion de nia literatura lingvo, se ne ankaŭ de la konversacia.

La tragedion de ĉi tiu krimromano mi resumas per la vortoj: *Deklerko murdis Dorvalon*. Se vi tamen volas aĉeti la kadavron, ne forgesu, ke malsufiĉas *PIV kun Suplemento*...

Georgo Kamaĉo (Hispanio)

kaj ŝiaj infanoj ankaŭ al la nova vivmedio. Kunvivante, ĉiuj familianoj ĉiam pli intimiĝas inter si, ĝis Maureen, jam preskaŭ 18-jara, kaj Kevin, la plej aĝa filo de Joe, gefianĉiĝas. Fino.

Pri la lingvaĵo de tiu ĉi libro mi estas malpli entuziasma. En pluraj lokoj la libro impresas, kvazaŭ la aŭtorino pensus angle kaj skribus Esperante. La frazoj havas anglan "konstruoplanon", dum ĉe iuj vortoj ŝajnas, ke la aŭtorino, tradukante plursignifan aŭ larĝsignifan anglan vorton, prenis iun el la maltrafaj aŭ malproksimaj signifoj. Notinda estas i.a. la sistema uzado de prepoziciaj konstruoj anstataŭ akuzativaj (saluti al, demandi al, akompani al...) kaj adverbaj (je ĵaŭdo, je vespero), kaj ofta malĝusta uzado de la artikolo kaj de

la komo. Sed strange: la diversaj malĝustaĵoj estas tiel oftaj kaj sistemaj, ke la lingve malpli postulema leganto post iom da tempo al kutimiĝas al ili, komencas senti ilin kvazaŭ apartan stilon de la aŭtorino. Kaj malgraŭ tio, ke oni jam post kelkaj ĉapitroj antaŭsupozas la feliĉan finiĝon de tiu ĉi provincfamilia romantika idilio, en kiu kvazaŭ nenio povus malsukcesi, oni ne forĵetas la libron sed legas plu – eble ĉar la detaloj pri la vivo de irlanda provinca familio estas simpatie kaj interese prezentitaj.

Kun la eldiritaj rezervoj, ambaŭ libroj – ĉiu siamaniere – estas bonvena pliriĉigo de la originala distra Esperanta literaturo. Sendube ambaŭ trovos siajn legantojn.

Eduard V. Tvarožek (Ĉeĥoslovakio)



Pruvo, ke ne ĉion indas traduki

La komedio de eraroj. William Shakespeare (1564-1616). El la angla trad. William Auld kaj Asen Simeonov. Glasgow/Sarajevo: Kardo/ELBiH, 1987. 88p. 21cm. 15,90 gld.

Ve, *La komedio de eraroj* mem estas eraro. Kial? Simple, ĉar traduki la tutan literaturon de iu ajn nacio estus absurda ideo. La tradukantoj devas severe elekti siajn taskojn. Kaj kion ili elektu? Klare – nur la plej bonan, perfektan, nur la plej-plej-plejan oni akceptu por la Esperanta trezorejo. En ĉiu nacia lingvo ni trovas sufiĉe da grandaj figuroj nepre prezentendaj. Sed ilia spirito manifestiĝas en la ĉefverkoj, la kerno de la heredaĵo. La cetero kuŝu trankvile en la naciaj kulturoj, kie ĝi estas bone rezervita.

Neniu naskiĝas jam preta genio. La homo kreskas, maturiĝas; li serĉas kaj provas. Unu el tiuj provoj estas *La komedio de eraroj* de Shakespeare. Tiu frua dramo baziĝis sur du klasikaj komedioj de Plaŭto, kaj filozofie tiu simpla kunmeto aspektas sufiĉe eklektika kaj neniel ekzemplodona. Ĝia aŭtoro provis manipuli tre rezistan materialon kaj pro tio diris absolute nenion novan en literatura senco. Ĝi estas amuza, sufiĉe aŭdaca ŝerco de la onta geniulo.

Vere: jen kaj jen sentiĝas io el la Granda, el la matura Shakespeare. Sed multe pli grandan efikon oni povas ricevi surscenigante, ekzemple, la scenon el la dua akto de Romeo kaj Julieta – cetere, jam tradukitan.

Viktor Sapoņnikov (Rusio)

Kontrolenda kontrolado

Puphejmo (1879). Henrik Ibsen. El la norvega trad. Odd Tangerud. Høkk-sund: la tradukinto, 1987. 57p. 24cm. 24,60 gld.

Ibsen kompreneble estas mondliteratura giganto, kaj *Puphejmo* apartenas al liaj plej pintaj verkoj – ne multo perdiĝis el ĝia aktualeco, la akra kritiko kontraŭ la etburĝa familio kun polurita fasado, spite la 110 jarojn kiuj pasis de post la apero de la originalo.

Do nepre tradukinda verko? Ja, kial ne. Tamen jam aperis en Esperanto tri teatraĵoj de Ibsen; cetere ili ĉiuj estas aĉeteblaj ĉe UEA. Multaj certe rekonas la titolojn *Peer Gynt*, kaj speciale *Brand*, kiu aperis kiel n-ro 13 en la Serio Oriento-Okcidento en 1978. Krome mi trovis, foliumante mian Katalogon, iun *Reaperantojn*. Laŭ *Esperanto en perspektivo* ĝi aperis en 1910, dua eldono (eĉ!) en 1925. Do ekzistas jam tradicio de tradukoj el Ibsen.

Por honori la tradicion la nivelo de la tradukoj devus kompreneble konstante altiĝi, aŭ (se oni jam atingis la apogeon) almenaŭ resti pinta. La Esperantan tradukon de *Peer Gynt* iuj opinias la plej bona en iu ajn lingvo, kaj tiu de *Brand* certe ne postrestas – ja samas la tradukinto, Erling Anker Haugen, kiu forpasis antaŭ nur kelkaj monatoj.

Kiel la nuna tradukinto do sukcesas pri sia tasko? Bedaŭrinde ne tro bone. La sintakso estas multloke klare influita de la norvega aŭ simple fuŝa. Kelkaj parolturnoj estas kompreneblaj nur helpe de iu nordia lingvo (ekz. "pri tio vi ne estas viro helpi min" kun la signifo "vi ne kapablas helpi min pri tio", p. 53). Preskaŭ ŝoka estas la uzo de la norvega "Ak!" anstataŭ "Ho!". La traduko nepre bezonus prilaboron por esti akceptebla.

Des pli bedaŭrinde estas, ke sur la kovrilo estas presita: "Lingve kontrolita de Esperantista Verkista Asocio". Krome la tradukinto en la antaŭparolo dankas "plurajn spertajn esperantistojn" pro iliaj kritiko, konsiloj kaj kontrolo. Oni ne povas tro akcenti, ke lingva kontrolado kaj reviziado estas enorme respondeca kaj neniel facila tasko. Por tiu laboro ne sufiĉas perfekta lingvoscio kaj unuaranga stilsento. Necesas ankaŭ amaso da tempo kaj pacienco. Kiu ne posedas ĉi tiujn, ne entreprenu la taskon.

Kalle Kniivilä (Finnlando)

Lingvo:

Ĉu aŭ ne renomi la mondon?

Kiel trakti proprajn nomojn en Esperanto? La problemo samaĝas kiel la lingvo mem. Zamenhof skribis en 1890, en La Esperantisto: "La logiko kategorie ordonas, ke por ĉiuj nomoj estu enkondukita unu egala ortografio (la simpla ortografio Esperanta), ĉar alie, trovante en Esperanto ian nomon, oni neniam scios, kiel ĝin elparoli." La sekvan jaron li pli detale traktis la demandon, proponante elekton inter uzado de la nacilingva formo, ortografia-fonetika esperantigo kaj plena (t.e. ankaŭ gramatika) esperantigo. Ankaŭ tiam li esprimis la opinion, ke tiu lasta "maniero de uzado estas ĉiam bona kaj regula kaj, kiel mi jam diris, poste kun la tempo ĝi kredeble fariĝos la sola maniero de uzado por ĉiuj nomoj."

Tiu tago ankoraŭ ne venis. Ni prezentas ĉi tie kelkajn lastatempajn voĉojn en la debato. Roland Schnell parolas por alternativo: ke la esperantistoj lernu legi aliajn alfabetojn krom la sian. Bernard Golden favoras esperantigon, sed trovas la proponojn de Rikardo Ŝulco kaj Hermano Bermanno multilate nekontentigaj. Joe Gamble prezentas kompromison: pli vastan uzon de tio, kion Zamenhof nomis "proviza alfabeto por fremdaj sonoj". Ĉiuj vidpunktoj meritas konsideron – kaj speciale en 1990, Internacia Alfabetiga Jaro!

Ne fermu la fenestron al aliaj kulturoj

La magio per vortoj ne estas privilegio de primitivaj kulturoj. La kapablo kaj la rajto doni nomon al objektoj kaj estaĵoj havas ŝlosilan rolon en la pretendo de la homoj domini ĉion alian. La kristana dio al Adamo donis la rajton nomi bestojn kaj plantojn. En iuj kulturoj la ekscio de la nomo povas doni potencon al la malamiko.

La ŝanĝo de propraj nomoj ĉiam estas elemento de potenco kaj subpremo. El Bulgario fuĝis la turkdevenaj enloĝantoj, ĉar ili devige ricevis bulgarcajn nomojn. Ĉie, kie iu potenco sukcesis konkeri terenon, ĝi provas ŝanĝi la trovitajn proprajn nomojn laŭ la propraj kutimoj. Germanoj speciale konas ĉi tiun problemon, ĉar iuj regionoj, kiuj hodiaŭ apartenas al Francio, Italio, Pollando, Ĉeĥoslovakio, estis iam parto de la germana imperio. Pro tio multaj urboj tie havas germanecajn nomojn.

Modo sen racia bazo

Hodiaŭ estas rimarkebla inundo de esperantigitaj propraj nomoj. Dum multaj jaroj tiu ĉi kutimo estis limigita al la urboj de la mondaj kongresoj, kaj al malgranda nombro de internacie konataj urboj, kiuj en la diversaj naciaj lingvoj havas apartan, pli facile prononceblan nomon. Ekzemple la germana urbo München estas Munich por angloj kaj usonanoj, Monaco por

*"La pacama lingvo
de Zamenhof
ne al kutimiĝu al
nova formo de
monda regado per
la magio de vortoj."*

italoj, kvankam ĝi neniam apartenis al Britio aŭ Italio. Krome estis uzataj esperantigitaj formoj de oftaj personaj nomoj por faciligi la buŝan komunikadon, kaj kelkaj uzis esperantigitajn formojn eĉ de la familia nomo. Sed intertempe la esperantigo de propraj nomoj iĝis modo, kiu ne plu havas racian bazon.

Kion fari por ekscii, kiu estas Guntro Vetŝtedo el Ajnbeko, kie troviĝas Ojpeno, kaj ĉu leteroj atingos Kristofon Fukson en Eperthaŭzo aŭ Klaŭzon Gunkelon en Eŝvajlo? Tiuj estas ekzemploj hazarde elektitaj el "speciala cirkulero", kiu sisteme esperantigas laŭ instigo de iu Rikardo Ŝulco eĉ la plej mizeran vilaĝon de Federacia

Respubliko Germanio. Post la kompleta esperantigo de Germanio (aŭ almenaŭ de ties propraj nomoj) li verŝajne prilaboros liston de geografiaj nomoj de Eŭropo, de la mondo, de la kosmo.

La uzo de esperantigitaj nomoj de urboj kaj homoj en tiu maniero estas sensencaĵo, kiu nur kaŭzas apartajn problemojn. Tio estas des pli ridinda, ĉar Esperanto estis kreata por faciligi la internacian komunikadon. Fariĝos neeviteble eldoni dikajn librojn, kiuj enhavos listojn de esperantigitaj propraj nomoj kaj iliajn ekvivalentojn en la oficiala nacia skribmaniero, se oni deziras trovi amikon en telefonlibro aŭ aĉeti bileton al la koncerna urbo. La revo konvinki poŝtistojn aŭ fervojistojn per la strange skribitaj nomoj estas absurdaĵo, ĉar la deĉifrado nur kostas tempon al ili.

Argumento por la esperantigitaj nomoj estas, ke por eksterlandanoj la originala formo estas malfacile prononcebla. En *Monato* oni kutimas aldoni la proksiman prononcadon inter krampoj, dum la skriba formo restas la konata. La kontraŭargumento, ke tio funkcias nur por latinliteraj lingvoj, pravas. Fakte ĉiu tia lingvo uzas alian sistemon por reprodukti nomojn skribitajn en aliaj alfabetoj, ekzemple en la cirila. Sed tiu argumento nur pravas la mankon de fantazio de la perfortaj esperantigantoj. Oni ne povas reprodukti proprajn nomojn en la skribmaniero de ĉiuj alfabetoj, asertas ekzemple Hermano Bermanno.

Kial ne pli da alfabetoj?

Kial ne? Ni estas al kutimigitaj al tajpiloj, kiuj havas malpli ol 100 diversajn literojn. Ĝis nun pro teknikaj kialoj ankaŭ presiloj kaj fotokompostiloj havas limigitan nombron da literoj kaj litertipoj. Sed la tekniko rapide progresas. La 24-pinglaj printiloj kaj laserprintiloj ebligas miksi diversajn alfabetojn en la sama linio. Oni povas meti en tekston en la latina alfabeto literojn de aliaj alfabetoj kaj eĉ ĉinajn signojn, se estas dezirate. Kompreneble ankoraŭ ne ĉiuj programoj por tekstoprilaboro permesas tion, ili ja eĉ ne facile permesas skribi en Esperanto. Sed tio estas solvebla problemo.

Anstataŭ forviŝi ĉiun rilaton al naciaj kulturoj el Esperanto, mi proponas malfermi la fenestron al fremdaj kulturoj kaj laŭeble citi proprajn nomojn en la koncerna nacia skribmaniero. Estus la devo de la esperantistoj postuli tion de la produktantoj de tekstoprilaboraj programoj, kaj de la kon-

cernaj eldonejoj kaj redakcioj. Kial ne alkitimiĝi al la deĉifrado de arabaj kaj hebreaj propraj nomoj, kiel ni alkitimiĝis al la prononcado de vortoj el diversaj lingvoj en la latina alfabeto? Inter krampoj ĉiukaze estu indikata la prononco en Esperanto.

La respekto al aliaj kulturoj postulas respekton al iliaj individuaj ecoj, kaj la skribmaniero estas unu el tiuj ecoj. Se esperantistoj komencas forigi kaj nuligi ĉi tiujn ecojn, ili agas kiel diktatoroj, kiuj detruas en sia regno ĉiun fremdaĵon. La pacama lingvo de Zamenhof ne alkitimiĝu al nova formo de monda regado per la magio de vortoj. Protestu kontraŭ la deviga esperantigo de viaj propraj nomoj. Via propra nomo estas parto de via konservinda nacia kulturo!

Roland Schnell, Berlin
(kaj ne ŝnel el berleno)

Sisteme, ne ŝulce


Leksara kolekto de ofte uzataj propraj nomoj. Kompilita de Rikardo Ŝulco kaj Hermano Bermano. Paderborn: Esperanto-Centro, 1989. 141p. 21cm. 24,60 gld.

Registritaj en tiu ĉi kolekto estas miloj da propraj nomoj, precipe tiuj rilatantaj al geografiaj lokoj, gentoj, rolantoj en literaturaj verkoj, historiaj figuroj kaj ankaŭ membroj de la Esperanto-komunumo. Asimilis tiun grandan kvanton da onomastika materialo Richard Schulz, la korifeo de la Analiza Skolo, kun la helpo de sia ĉefdisĉiplo, Hermann Behrmann, libroeldonisto el Paderborn, FR Germanio. En unu alfabeto vicordo troviĝas la esperantigitaj nomoj kaj ankaŭ iliaj originalaj etnolingvaj formoj. Trompe troiga estas la karakterizaĵo en la librotitolo "ofte uzataj". Verdire, el tiu miriado da nomoj ĉerpitaj el ie, tie kaj ĉie, granda parto estas "ofte uzata" nur de la posedantoj mem kaj la lokaj enloĝantoj. Tiuspecaj nomoj, do, tute ne plenumas la kriterion de internacieco kaj konsistigas ŝimantan lingvan balaston.

Mankas klarigo pri la labormetodoj de la kompilintoj kaj la lingvistikaj principoj gvidantaj la asimiladon. Zorga komparado de la Esperantaj versioj kun la originalaj nomoj evidencigas nescion pri la fonetikaj sistemoj de la fontlingvoj. La rezulto estas groteska misformado de multaj nomoj ĝis nereconebleco. Krom fonetike

kaprica kripligo (*Rzeszów* – *Ĵeŝovo*), okazas ankaŭ arbitra amputado de silaboj, tiel donante al kelkaj "ŝulcigitaj" nomformoj piĝinecan aspekton (*Mommsen* – Momzo, *Johnson* – Ĝonzo). Ankoraŭ unu fantazia rimedo estas traduko de etnolingvaj nomoj, tute aŭ parte, en Esperanton (*Schweinfurt* – Porkvadejo, *Chatham* – Babilŝinko); tiel kreigaŝ apenaŭ deĉifreblaj enigmoj.

En ĉiuj siaj aliaj verkoj Schulz senĉese papagumas, ke li sekvas "la logikon". Nu, mi defias lin klarigi en racia maniero sian traktadon de la franca digramo *qu*: en *Québec*/Kebeko kaj *Quimper*/Kimpero ĝi estis transliterita per "k", sed pro iu nekomprenebla



Golden kaj Ŝulco:
Du el la plej
energiaj propraj
onomologoj tamen
sekvas malsamajn
principojn.

kialo ĝi fariĝis "kv" en *Quatremère*/Kvatremero kaj *Saint-Quentin*/Sankvento. Ankoraŭ unu ekzemplon de fonetika fuŝado provizas la hispana urbno *Zaragoza*, en kiu la dufoje uzata litero *z* aperas en la "ŝulcigita" versio kiel "z" en la unua silabo sed kiel "s" en la lasta: *Zaragoso*! Pli harstariga kaj objektiva pruvo, ke Schulz ne estas kvalifikita entrepreni la taskon de asimilado de propraj nomoj, estas lia transskribado de la franca fonemo /*ũa*/, kiu aperas grafeme kiel *oi* aŭ *oy*. Li trovis ne malpli ol kvin (5) manierojn "ŝulcigi" ĝin: *Loire*/Loiro, *Loisel*/Loazelo, *Poitiers*/Puatjero, *Blois*/Blezo, *Troyes*/Trojezo. Eblas daŭrigi tiun ĉi prezentadon per pli da ekzemploj de nekonsekvenca asimilado.

Por saĝulo sufiĉas aludo (z)

Rimarkinte en antaŭe publikigitaj verkoj de Schulz, ke li ne sufiĉe profunde komprenas la fonetikon de la hispana lingvo, mi sendis al li omaĝe ekzempleron de mia detala studaĵo enhavanta principojn por la asimilado

de hispanlingva leksika materialo (1). Bedaŭrinde, ekzameno de la enhavo de *Leksara kolekto* indikas, ke li ne utiligis miajn sugestojn sed obstine daŭrigis sian ekstravagancan esperantigadon. Pro sia diletanteco sur la tereno de la Esperanta onomastiko, Schulz semas pli da duboj kaj konfuzado.

Por sekvi la konsilon de Zamenhof kaj iam en la estonteco asimili ĉiujn proprajn nomojn, estas necese adopti sistemajn rimedojn. Mi jam menciis mian formuladon de reguloj por hispanlingvaj nomoj. Aliaj pioniroj sur tiu ĉi kampo jam publikigis siajn proponojn por apartaj etnolingvoj (2). Iom post iom pli da lingvoj devas esti al-

donitaj, ĉar nur tiu procedo promesas alporti utilajn rezultojn. Kaj nur tiu maniere estos eble eviti la bizaran "ŝulcigadon" de propran nomoj.

Bernard Golden (Hungario)

1. Bernard GOLDEN. Principoj por la esperantigo de hispanlingvaj vortoj kaj propraj nomoj. Paĝoj 235-257 en: *Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo*, II. Esperantismo. La Laguna: Universidad de La Laguna, 1987. 790p.

2. Naokazo KAWASAKI. Esperantigaj principoj de japanaj vortoj. *Esperantologio*. 1950; 1 (2): 88-97.

Josef KAVKA. Esperantigo de ĉeĥoslovakaj loknomoj. *Scienca Revuo*. 1978; 29 (3 [131]): 119-127.

Wouter E. PILGER. Problemoj de esperantigo de nederland(lingv)aj loknomoj. Paĝoj 557-570 en: *Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo*, II. Esperantismo. La Laguna: Universidad de La Laguna, 1987. 790p.

Ebbe VILBORG. Esperantigo de grekaj nomoj. *Esperantologio*. 1961; 2 (2): 152-158.

Vojoj el la propra-noma labirinto

Se homo, kiam oni montras al li skribitan vorton, estas devigata demandi, kiel oni devas ĝin prononci, aŭ kiam oni al li diktas—kiel necesas ĝin skribi—, tiu homo estas senalfabeta!

—Leo Tolstoj, citita en *Leo Tolstoj* de Victor Lebrun, p. 291.

Tolstoj pravis. En Esperanto, same kiel en multaj eŭropeaj lingvoj, la skribado de neesperantigitaj propraj nomoj okazas ĥaose kaj malfonetike. Laŭ mia hasta kalkulo, la proporcio de tiaj nomoj en Esperanto varias de malpli ol 1% ĝis 4% — meze eble 2%. Laŭ tio, oni povus diri ke la lingvo Esperanto estas 98%-e pura (fonetika) kaj proksimume 2%-e putra (malfonetika). Pri tiuj nomoj eĉ la plej spertaj esperantistoj estas parte analfabetaj (nelegipovaj).

La okcidenta eŭropa metodaĉo de skribado de propraj nomoj estas jena:

1. Se la nomoj estas nacie skribataj per latinaj literoj, oni skribas ilin senŝanĝe kune kun naciaj fonetikaj kaj nefonetikaj kromsignoj. Kelkaj esperantistoj klopodas informiĝi pri la prononco kaj strebas memori ĝin, ofte sensukcese. Sed la pli multaj tute rezignas pri la prononco. Kvankam la sistemo estas bona por la poŝto, ĝi estas tute fuŝa por la parolo.

2. Malgranda parto de la Esperanta gazetaro kaj libraro unufoje aldonas proksimuman — t.e. torditan — prononcon en la tre simpla Esperanta alfabeto. Tiu ĉi “proksimume fonetika” literumado de la sama nomo ofte varias de fojo al fojo kaj de gazeto al gazeto. La ordinario plej ofte forgesas la prononcon, ĉar li vidis ĝin nur unufoje.

3. Strange, se la nomoj ne estas en latinaj literoj, esperantistoj neniam skribas ilin naciskribe, eĉ kiam la skribo (ekz. la hinda, rusa, japana, korea) estas mirinde fonetika kaj (kompare al la angla kaj franca) relative facile lernebla, kaj eĉ facile tajpebla pere de komputiloj. Anstataŭ tiu pli universala metodo, esperantistoj skribas la nomojn per *diversaj* latinliteraj transskriboj, ekzemple per la oficialaj japana kaj ĉina sistemoj, aŭ per unu el la multaj aliaj transskriboj, aŭ per esperantigitaj naciaj transskriboj (kiel faras *El popola Ĉinio*, la rusaj esperantistoj kaj duono de la

japanaj). Kompreneble tiu ĉi lasta metodo estas la plej bona.

Estas necese rekoni ke, se temas pri miliardoj da apartaj propraj nomoj, neniu solvo estos facila. Uzo nur de la tre limigita Esperanta alfabeto ne estas kontentiga. La francisma Internacia Fonetika Alfabeto ne estas praktike uzebla, ĉar, kvankam ĝi estas treege helpa kaj preciza, ĝi estas malfacile presebla kaj tajpebla. (Krome, kune kun aliaj fuŝoj, oni ne povas per ĝi precize skribi la originalajn latinajn, Esperantajn, ĉeĥajn kc. vokalojn, kiujn la francaj parolantoj disigis en parojojn el pli fermita kaj pli malfermita vokaloj.) Sendube la plej bona vojo estas ellabori Latinliteran Esperanto-konforman Interfonetikon (LEI), kies bazon mi prezentas ĉi-kune.

LEI estas konstruita tiel, ke se oni lernas la simplajn sonojn q, x, w, y, ‘, kaj se oni ignoras la eksteresperantajn kromsignojn, la prononco estas la plej bona, proksimuma Esperanta formo. Do, se esperantisto ne scias la novajn kromsignojn — kaj komence ĉiuj estos

tiaj — li/ŝi povas proksimume prononci la nomojn kaj plej ofte esti komprenata. Aliflanke, kiam oni jam lernis la LEI, oni povas senhezite elparoli novan nomon skribitan en ĝi kaj skribi novan nomon aŭditan, el iu ajn lingvo aŭ regiono, ĝuste kiel postulis Tolstoj.

Kompreneble miaj elektoj ne estas la solaj eblaj. Oni povas krei centojn da LEI-oj. Kaj laŭ mi neniu povas devigi esperantistojn uzi LEI aŭ fari iun ajn alian aferon. Plej bone estus publikigi LEI en apendico al *Plena ilustrita vortaro* kaj en dulingvaj vortaroj, por laŭvola uzo de ties legantoj.

Surbaze de la ĉi-kuna skizo, mi jam kreis kompletajn LEI-alfabetojn por la franca, ĉina, hinda, angla, kaj por multaj aliaj lingvoj tio estus tre facila. La celo ne estas superhoma precizeco, sed nur adekvata komprenebleco kaj ebleco rekonstrui la originalan nomon. Ĉu LEI taŭgus por via lingvo? Se ne, kion vi volas aldoni?

Ĝo Gëmbll (Joe Gamble)
P.O. Box 1956, Beaverton
OR 97075-1956, Usono

Latinlitera Esperantokonforma Interfonemaro

1. La tuta Esperanta alfabeto restas senŝanĝa.

2. Jenaj ne-Esperantaj literoj havas ne-Esperantajn sonojn:

Konsonantoj: q = uvula k, kiel en la araba

’ = glota plosivo, kiel en la araba kaj persa

Vokaloj (nudaj por ebligi modifon laŭ (4) sube):

w = la franca *monsieur* aŭ germana ö

x = la e en franca *de* aŭ angla *the*

y = la germana ü aŭ rusa bl

3. Konsonantoj modifiĝas per jenaj supersignoj:

^ = ĝenerala ŝanĝo: krom ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ankaŭ

đ (angla *the*), ĥ (angla *both*), ħ (ĉeĥa ř)

˙ = retroflekso (hinda-sanskrita ṭ, ḍ, ṇ, angla ř)

˘ = pli malantaŭa (ekz. ñg, ñk en pluraj lingvoj)

ñ = vokala nazaligilo (ekz. franca *Gauguin* = Gogen)

rr ll nn = silablongaj konsonantoj (Brrno, Andersnn, Gëmbll)

4. Vokaloj modifiĝas per jenaj supersignoj:

^ = pli vasta: ê (angla *Annie*), ‘ (franca *Pasteur*) ktp

˙ = pli ferma: é (franca *café*), ó (franca *Bordeaux*)

â = iom rondlipa a, multe malpli ronda ol sveda å aŭ franca o

˘ = duonvokala: ĵ (franca *nuit*), ĥ (brita *here*), ħ (itala *Beatrice*)

5. Akcento:

La signo _ estas uzata kiel vokala subsigno kiam la akcento

ne estas antaŭlasta; ankaŭ por indiki longan vokalon

(ekz. japana Kjuŝu Gitau).

Interesatoj bonvolu kontakti la aŭtoron (adreso supre) por ricevi plenan priskribon.

Reagoj

Distingi ludojn kaj evoluon

Baldur Ragnarsson (februaro, p. 32-33) recenzas la libron *La bona lingvo* de Claude Piron hezite kaj nedecidiĝeme. Kiel lingvosciencisto kiu profesie laboras pri Esperanto, mi ŝatus aldoni opinion multe pli klaran kaj senrezervan.

Konsentite, Piron estas subjektiva. Li tion ne kaŝas. Sed en la vasta kaj bunta mozaiko de opinioj pri Esperanto, Piron estas unu el tre malmultaj kiuj profunde komprenis, kiel evoluas vivanta homa lingvo.

Esperanto estas lingvo dua. Ni ĉiuj devas unue lerni ĝin, kaj nur ekde certa nivelo de rego povas kontribui al ĝia pluevoluo. Lernemo do estas esenca premiso por aliĝi al la lingvokomunumo. Malgraŭ tio, en la prilingva debato en Esperantujo la nombro de la instruemuloj estas multoble pli alta ol tiu de la lernemuloj. Tro multaj volas stiri, ŝanĝi, "plibonigi" la lingvon, dum ĝi jam delonge forlasis la laboratorion. Esperanto ne plu estas stirebla, pli precize, ĝi ne estas pli stirebla ol iu ajn etna lingvo. Antaŭ ol influi la lingvoevoluan, oni devas ĝin zorge observi.

"Esperanto ne plu estas stirebla, pli precize, ĝi ne estas pli stirebla ol iu ajn etna lingvo."

Nur konstatinte la observeblan, nekonscie kaj kolektive evoluigatan normon oni povas aktive influi – kaj eĉ tiam eblas stiri nur en direkto, kiu restas proksima al tiu de la natura evoluo de la lingvo.

Piron tion bone komprenis, kaj verkas en lingvaĵo bazita sur longperioda, fajnsenta observado, ne sur apriora skemtrudado. La lingvaĵo de Piron tiel glate enfluas en la disvolviĝon de la lingvo kaj influas ĝin deinterne. La nekomprene pri la bezono unue profunde observi kaj poste, se entute, influi nur singarde kaj modeste estas laŭ mi esenca kaŭzo por tio, ke la granda plimulto de la stirklopodoj malkonformas al la eblecoj, kiujn la lingvo mem lasas. Tial la laboratoriaj ludoj

de Albault, Haupenthal, Ŝulco kaj multaj aliaj restas esence vanaj kaj senefikaj. Ili ekscitas la diskutantojn, sed la lingvon ne vere tuŝas. La kuri-oza "lingvopapo" de Golden ne havus pli da aŭtoritato.

Ankaŭ PIV evidente baziĝas sur grave maltro da observo kaj senteble tro da paŭsado de fontoj de ekster la lingvokomunumo. Sed dum neniuj verkis vortaron pli fidelan al la reala lingvo, PIV tenos sian influon dank' al sia monopola pozicio. Eĉ tiu influo, tamen, atingas la fakte uzatan lingvon nur certgrade.

Leginte *La bonan lingvon* de Piron vi aŭdos bonan lingvon multloke kaj multokaze – kaj lernos distingi ĝin de eksterkomunuma ludlingvaĵo.

Klaus Schubert (Nederlando)

La vera minaco

Mi opinias, ke la recenzo de B. Ragnarsson ŝajnas saĝe modera, sed ne scias, kiel kvalifiki la abomenindan tekston de J.-F. Farjon de Lagatinerie.

Ĝi estas teksaĵo de malbenoj, destinita mallevi la prestiĝon (larĝe merititan!) de nia korifeo, kiun mi ne hezitas nomi "la Viktoro Hugo de la internacia lingvo". Oni ne trenu en la koton tiel talentan homon, kiu baldaŭ atingos sian naŭdekan jaron kaj al kiu ni ŝuldas multon!

J.F. F.d.L. ĵaluzas kontraŭ G. Waringhien pro lia greka-latina kulturo aŭ ies influo: jen la motivo de lia paskvilo. Mi ne scias, kion konas G. Waringhien pri la ĉina, sed eble J.-F. F.d.L. legas, skribas kaj parolas ĝin perfekte. Mi tamen memoras, ke la maljuste kritikata parizano tradukis robajojn el la persa. Ĝis nun mi neniam aŭdis aŭ legis pri "izola" lingvo, sed pri unusilabvorta lingvo, kaj por mi "aglutina" kaj "kungluema" estas sinonimoj. ... Mi ankaŭ ne konsentas kun la diraĵo, laŭ kiu "la vortoj en iu ajn lingvo preskaŭ neniam respondas al tiuj de aliaj". ...

La "vera minaco" por Esperanto ne estas G. Waringhien aŭ K. Kalocsay, sed la pseŭdo-esperantistoj, kiuj rifuzas ĉian aŭtoritaton (ĉu de veraj eminentuloj aŭ de la Akademio) kaj tiel agante, kondukas la lingvon al ĥaoso. ... Eĉ se tio malplaĉas al s-ro J.F. F.d.L., mi diru al li, ke antaŭnelonge post iom da riparo de mia kara "biblia" PIV, nun dudekjara, mi donis al ĝi novan kovrilon!

J. Ducrocq (Francio)

Kial al la kurso?

Mi ne povas prijuĝi la agadon de Joachim Werdin el lia artikolo "Kaj post la kurso, kion?" (januaro, p. 10), sed se li levas nun tiun demandon, mi supozas ke ankaŭ li varbis por Esperanto kelkajn pliajn malamikojn.

Estas ĝenerala sperto, ke eĉ el inter la finstudintoj de la kurso multaj nek aliĝas al la movado, nek praktikas la lingvon. El enketo evidentiĝis, ke ĉ. 14 el 100 fariĝis malamiko de Esperantio. Ili estas tre danĝeraj por ni, ja ĉiuj neesperantistoj kredas, ke ili fidiinde konas Esperanton kiel iamaj anoj, kaj ili scias, ke esperantistoj ne plenumas tion, kion ili promesas. Esperanton ne eblas uzi tiel, kiel la varbantoj asertas.

La listo de J.W. montras ĉiun uzeblecon kiel bone funkciantan servon, eĉ ne per unu vorto indikante la limigitecon de ili. Se ni strikte, serioze, realisme, kritike analizas liajn proponojn, pri ĉiuj ni devus informi la lernontojn sincere, kiel vere funkcias tiuj servoj. Mi nun elstarigas nur kelkajn el ili. Se iu ŝatus korespondi kun Pollando, Ĉinio aŭ Hungario, tiu havus grandan ŝancon trovi korespondanton. Sed se ili volus korespondi kun okcidenteŭropanoj, aŭ trovi samfakulon, apenaŭ ili povus esperi respondon. La faka aplikado multe pli estas estonta ol nuna praktiko. Eĉ ne unu vere faka revuo funkcias en Esperantio (kelkaj fakecaj estas nur sciencpopularigaj), dum fakaj libroj tiel rare aperas, ke ili apenaŭ estas uzeblaj aŭ utilaj. Aboni revuojn eblas nur el malplimulto de landoj, pro nepagipoveco aŭ netranspagipoveco. La bagatelan obstaklon al aŭskutado de radioelsendoj – t.e. posedi konvenan radioaparaton – eĉ multaj eŭropanoj ne povas venki, se ne paroli pri la tempaj kaj enhavaj problemoj.

Ne estas tiel, ke mi vidas neniun uzeblon de Esperanto. Simple mi ŝatus atentigi ĉiujn varbantojn, ke ili ne troigu pri la uzeblo de Esperanto, ĉar ilia bonvolo tiam donos ankaŭ multan malutilon al nia movado.

Oszkár Princz (Hungario)

Ne sur fremda tero

En la decembra *Esperanto* (p.217), vi misinformis la legantojn, ke la Kataluna Kongreso de Esperanto okazis sur franca tero. Notu ke la Katalunaj Kongresoj de Esperanto okazas sur kataluna tero, ĉu tiu estas sub franca aŭ hispana ŝtatrego. UEA devus esti pli atentema pri tiuj aferoj.

Josep M. Altadill Alcoverro
(Katalunio/Hispanio)

**75-a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO, Havano (Kubo),
14-21 julio 1990**

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg
176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Adreso de LKK: Kuba Esperanto-
Asocio, Apartado postal 2018, 10200
La Habana 2, Kubo

KKS en Kubo: La Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, Nikola Rašić, vizitis Kubon duan fojon komence de aprilo. Tie la preparoj marŝas laŭplane kaj tre kontentige. Li, kiel aliaj, havis iom da zorgoj, ĉefe kaŭzitaj per legado de prikubaj lastatempaj artikoloj en eŭropaj gazetoj. Tamen la etoso en Havano estas tute malstreĉa, fakte pli vigla kaj gaja ol dum la novembra vizito. Komparoj inter Kubo kaj orienta Eŭropo estas tentaj, sed kelkrilate maltrafaj. Ne estas okazo timi pri malebligo de la kongreso.


Kondiĉoj kaj vizitoj: Kubo estas interesa kaj vizitinda lando, kiu malfermas sin al turismo larĝskale. Oni povas vidi tiujn klopodojn ĉiupaŝe. Al esperantistoj oni donas vere bonajn kondiĉojn: favorajn prezojn, kunlaboron kun la kubaj instancoj (Ministerio pri Kulturo, Universitato, fakaj asocioj k.s.). Estis fakte iom da miskomprenoj pri akirado de vizitoj kaj turismaj kartoj, kiujn oni povas ricevi ĉe ĉiu kuba ambasado kaj konsulejo. Estas konsilinde peti la turisman karton, kiu fakte plene anstataŭas vizon kaj ankaŭ malpli kostas. Kaze de apartaj problemoj UEA povas interveni kaj prizorgi turisman karton por vi.

Memoraĵoj: Jam aperis la du moneroj memore al la kongreso. Ili estas vere belaj kaj unikaj: verŝajne la unua oficiala mono de iu ŝtato kiu mencias Esperanton. La unuataga koverta kaj la kongresokaza poŝtmarko eĉ pli belas. Ankaŭ tiuj ĉi filatelaj posedas sian kuriozaĵon: ili certe estas la unuaj, kiujn desegnis LKK-ano de la koncerna kongreso (Miguel E. Peñate).

Eksteraj rilatoj: Oni organizis gazetaran konferencon okaze de la vizito de la KKS. Poste la ĉefaj radio-stacioj kaj gazetoj tre detale raportis pri la kongrespreparoj. Por la ĵurnalistoj oni ankaŭ projekciis la filmon pri Esperanto de Roman Dobrzyński. Interese estas, ke ĝi komenciĝas per scenoj el

Havano kaj ke oni povas vidi nunajn LKK-anojn kiam ili ankoraŭ sidis en la klasbenkoj!

Loĝado: Vizito al la amasloĝejo estis agrabla surprizo. Ĝi situas proksime al marbordo en tropika parko zorge kultivata. Niaj kongresanoj disponas tie pri klasĉambroj kun duetaĝaj litoj, grandaj kaj puraj lavejoj kaj duŝejoj, kaj du belaj restoracioj por la matenmanĝo. La estraro de la lernejo diras ke nokte oni organizas tie muzikon kaj amuzon. La allogaĵoj de tiu loko iom minacas, ke pluraj niaj kongresanoj restos ĝui tie kaj ne rapidos kuri al la kongresejo.



Helpantoj: Inter amaso da detalaj kunsidoj kun preskaŭ ĉiuj LKK-anoj, la plej interesa estis kunsido kun la helpantoj, kiu okazis en iu teatrejo en la urbocentro. Ĉeestis okdedo da homoj, sur kiuj baziĝos la sukceso de la kongreso. Ĉiuj donis impreson bone kaj serioze kompreni la respondecon de la tasko. Tio estis jam tria ilia kunveno, kaj laŭ la KKS oni povas lasi la kongreson en manojn de tiuj junaj kaj fervoraj esperantistoj. Tie, kie mankos sperto kaj scio, la problemojn verŝajne solvos ilia granda deziro ke la kongreso sukcesu, kaj ke ĉiuj kongresanoj fartu bone en ilia urbo kaj ilia lando.

Flugoj: Niaj klopodoj rezervi lokojn en la aviadiloj de la kuba nacia flugkompanio Cubana fine sukcesis. UEA nun proponas plurajn aldonajn flugojn el Eŭropo kontraŭ sama prezo, sen-

rigarde el kiu loko oni flugas. La prezo estas 1420 guldenoj por revenbileto. Jen la novaj flugeblecoj kun ekirdatoj/revendatoj interkrampe post la urbonomoj: Bruselo (8, 15 jul/reveno 21 aŭ 28 jul); Parizo (7, 14 jul/20, 27 jul); Berlino (10 jul/23 jul); Prago (13 jul/26 jul). Por tiuj kiuj flugas per aliaj kompanioj pro la Antaŭkongreso aŭ Postkongreso tra Meksikurbo, ni rezervis lokojn de tie al Havano en la aviadiloj, kiuj iras en 9, 13 kaj 14 julio; el Havano al Meksikurbo eblas refluigi en 20, 21 kaj 23 julio. Tamen, eblas ankaŭ en aliaj datoj poste, kondiĉe ke temas pri

lundo, vendredo aŭ sabato, kiam Cubana flugas inter Havano kaj Meksikurbo. La prezo por revenbileto inter Havano kaj Meksikurbo estas 480 guldenoj. Ankaŭ en la pli frue anoncitaj flugoj inter Eŭropo kaj Havano restas ankoraŭ disponeblaj lokoj.

Tago de la Paco: La ĉi-jaran programon prizorgas Mark Fettes, kiu kontakteblas pere de la Centra Oficejo. La Tago okazos ĵaŭdon, en la mateno. Kuba verkisto Lisandro Otero inaŭgure parolos pri la kondiĉoj por pluvivado de la homa civilizo en la 21-a jarcento, precipe pri ekologiaj imperativoj. Poste oni amplekse diskutos tiun temon: kontribuemoj bonvolu proponi sin, kun resumo de siaj ideoj, al la CO. Posttagmeze okazos aparta kunsido pri la eblo starigi internacian esperantistan Unesko-klubon.

Nekrologoj

Antal BARASEVICH (1926-1989), fakdelegito pri arbarkulturo, mortis fine de 1989 en Csákberény, Hungario.

Károly BÓDIS (1928-1989), fakdelegito pri instruado, mortis pasintjare en Dunaujváros, Hungario.

F-ino A. BREMS, dumviva membro de UEA, mortis pasintjare en Soest, Nederlando.

Mirdza BURGMEISTERS (1921-1989) forpasis la 23-an de oktobro en Riga, Latvio. Dum tri jardekoj ŝi estis kolono de la latva movado, i.a. kiel organizanto, tradukanto kaj historiisto. Ŝi postlasis eldonotan libron, *Rainis, Aspazija kaj Esperanto*, kaj multan dokumentan materialon.

Horace J. CLAYTON (1896-1989), delegito en Sheffield, Anglio, forpasis meze de 1989.

Patricia DE CLEENE, dumviva membro de UEA, mortis pasintjare en Auckland, Novzelando.

Anny ENZLIN, dumviva membro de UEA, mortis pasintan oktobron en Antverpeno, Belgio.

Brigitte FRANK-BÖHRINGER (1936-1990) mortis en Paderborn, FR Germanio, la 14-an de marto. Kun sia edzo Helmar Frank ŝi estis ĉefa organizanto de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino. Esperanton ŝi eklernis en 1974, kaj krom multaj personaj kontaktoj per la lingvo ŝi aŭtoris plurajn AIS-dokumentojn. En la kibernetika revuo *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft*, kiun ŝi ĉefredaktis ekde la sesdekaj jaroj, ofte aperis resumoj aŭ informoj en Esperanto.

Raimund HAABVERE (1909-1990) mortis antaŭnelonge en Tartu, Estonio, kie li estis fakdelegito.

Inĝ. Włodzimierz HEBDA (1919-1989), delegito en Albrechtice, Ĉeĥoslovakio, mortis fine de la pasinta jaro.

Anton HUEMER (1918-1990), aktiva esperantista instruisto kaj radioamatoro, forpasis la 11-an de februaro en Grein, Aŭstrio. Li prezidis Aŭstrian

Esperanto-Movadon dum la lastaj dek jaroj.

Edgard JOUIS, dumviva membro de UEA kaj fakdelegito pri scienco en Boisguillaume, Francio, forpasis antaŭnelonge.

Johannes van KEULEN (1922-1989), fakdelegito kaj multjara redaktoro de *Dia regno*, mortis la 21-an de aŭgusto en Vlaardingen, Nederlando.

Elvira LIPPE (1905-1989), kiu famiĝis kiel Esperanta poeto en la sesdekaj jaroj, mortis la 19-an de novembro en Latvio. Ŝiaj poemoj kortuŝe prikantas naturan belecon kaj la sopiron al paco.

Erik LUNDVALL (1901-1989), delegito en Börlange, Svedio, forpasis antaŭnelonge.

Erwin MELLE (1913-1989) forpasis pasintjare en Düren, FRG, kie li estis delegito.

John MOE (1918-1989), fakdelegito pri fervojoj, mortis la 20-an de oktobro en Oslo, Norvegio.

Johannes B. PEDERSEN (1913-1989), delegito dum pli ol dudek jaroj, mortis meze de 1989 en Kolding, Danio.

Giuseppina PICCIOTTO DE VITA (1916-1989) forpasis en marto 1989 en Palermo, Italio, kie ŝi estis delegito dum trideko da jaroj.

D-ro Luigi POLESE (1915-1989), fakdelegito pri ekonomio kaj konata E-instruisto, mortis pasintjare en Milano, Italio.

Gernot RITTERSPACH (1928-1990) forpasis la 13-an de januaro 1990. Li estis fakdelegito pri fervojoj en Mainz, FR Germanio. Kadre de la Terminara Komisiono de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFE), li kunordigis la verkadon de la elstara *Fervoja terminaro* (1989). Li ankaŭ signifis kontribuis al la fervoja fakliteraturo en Esperanto.

Henrik (Heinrich) SEPPIK-SEPAMAA (1905-1990), pioniro de la estona movado, forpasis la 4-an de februaro. Li debutis internacie per traduko el Friedebert Tuglas, *Kvin noveloj*

(1924), kaj en la jaroj 1929-39 dediĉis sin al la instruado de Esperanto en Svedio, Norvegio, Danio kaj Ĉeĥoslovakio. En 1935 aperis lia *Sistema kurso de Esperanto*, kaj en 1938 la fama kurslibro *La tuta Esperanto*. Dek jarojn (1947-56) li pasigis en stalina koncentrejo; tamen eĉ poste li aktivis sub la kaŝnomo Sepamaa, i.a. aperigante estonan-Esperantan vortaron kaj redaktante E-eldonaĵojn por estonaj eldonejoj.

Hans SIFFRIN (1901-1990), dum multaj jaroj la delegito en Stolberg, FR Germanio, mortis la 30-an de januaro.

Jan SLAATS (1902-1990) mortis en Aarle-Rixtel, Nederlando, kie li estis la delegito dum kvindeko da jaroj. Li estis prokuristo de la eldonejo "Boekdrukkerij Helmond", kiu eldonis en la tridekaj jaroj la Idealan Esperanto-Bibliotekon.

Fritz STRÖM (1902-1989), la delegito en Kumla, Svedio, forpasis la 29-an de novembro.

Mihai TICLETE (1960-1989) mortis sur la Placo de la Libereco en Cluj-Napoca, Rumanio, dum la popola revolucio la 21-an de decembro. Li estis aktiva membro de pluraj humanismaj movadoj, kaj esperantisto de kvin jaroj.

Mihail VAIL (1906-1990), delegito en Kievo dum la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj, mortis la 1-an de februaro. Li aktivis por Esperanto en Ukrainio ekde 1924.


D-ro Charles WEISSHEYER (1903-1989), ĝis 1987 delegito en Mulhouse, Francio, mortis fine de la pasinta jaro.

Philip C. WILLEY (1922-1989) delegito en Portishead, Anglio, kaj fakdelegito pri turismo, mortis en Bristol post kelkmonata malsano.

Doris M. WORCESTER, dumviva membro de UEA, forpasis la 18-an de aŭgusto en Ashted, Britio.

Zlata ZACHO (1939-1989), blinda jugoslava esperantistino vivinta en Danio, mortis la 31-an de oktobro pasintjare. Ŝi tre aktive kontribuis al la blindulaj kaj esperantistaj movadoj. La novelisto Srdj Arandjelović eternigis ŝiajn volon kaj kuraĝon en la rakonto "Sur dalmata fiŝistinsulo" (*Paŝoj al plena posedo kaj Trezoro*).

Laste aperis...



Artikolo, La. Komparo de ĝiaj uzoj inter Esperanto, la angla, kaj aliaj etnaj lingvoj rilate al propraj nomoj kaj abstraktaĵoj. Yamasaki Seikō. Tokio: la aŭtoro, 1989. 90p. 21cm. Dulingva: celita al japanlingvanoj, sed utila ankaŭ por aliaj. 14,70 gld.

Bermuda triangulo, La. Karolo Pić. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1989. 188p. ISBN 39 2761 305 3. 21cm. Originala novelaro, ofte streĉa aŭ erotika, verkita tra 25 jaroj. Postvorto kaj glosaro iom klarigas la estiĝon de la rakontoj kaj ilian nekutiman lingvaĵon. 48,60 gld.

Esperanto en prospektivo. Esperantismologia studo. Giordano Moya. Barcelona: Esperanto-Centro, 1989. 143p. 21cm. ISBN 84-404-5487-2. Provo aktualigi la Zamenhofan koncepton pri homaranismo kaj ligi ĝin al la moderna E-movado. 21,60 gld.

Grandaj pandoj – brilaj steloj. Geng Ŝouĝong. Ilus. Jang Jongĉing. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1988. 46p. ISBN 7-5052-0017-8. 26cm. Pri la dresado de pando en cirko. 7,20 gld.

Leteroj de Sebert al Ludoviko. Detala raporto pri la delegacia afero. El la franca trad. Marcel Delcourt kaj Robert Lloancy,

komp. kaj red. Ludovikito. Kioto: Ludovikito, 1990. 280p. Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof: kromkajero 6. 21cm. Kvazaŭa kompletigo de volumo 8 en la sama serio, detale montranta la respondon de la esperantistaj gvidantoj al la Ido-krizo. 48,00 gld.

Milito ĉion detruas! Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof: kajero 10-bis. Kioto: Ludovikito, 1990. 442p. 21cm. Fotorepresaĵoj el la jaroj 1912-14, de artikoloj (ne de Zamenhof!) en *Lingvo internacia* kaj *Esperanto*. 48,00 gld.

Pri Esperanta literaturo (1912). Edmond Privat. Wien: Pro Esperanto, 1990 (3-a eld.). 28p. 21cm. Pionira teoria parolado. 4,50 gld.

Ploroj kaj ridoj. A. Lopez Luna. Buenos Aires: Amigos de Lopez Luna, 1989. 102p. 18cm. Mimeo. ISBN 950-43-2599-8. Rakontetoj kaj meditoj doloraj kaj amuzaj. 8,10 gld.

**Al la revuoj,
kiuj aboneblas
pere de UEA,
aldoniĝis
JUGOSLAVIA
STELO (20,00
gld.), ILTIS-
FORUMO
(29,00 gld.)
kaj ESPERANTA
MORMONARO
(30,00 gld.).
Por la ceteraj,
vidu pasintan
decembron!**



Ŝtono de helpo. Hans Warren (ps., 1921). El la nederlanda trad. Gerrit Berveling. Den Haag: Esperanto Kultura Servo, 1989. 72p. 21cm. Drameca novelego pri amikeco, amo, malamo kaj morto, kiu finiĝas korŝire. 19,50 gld.

Zamenhofa ekzemplaro. Komp. Rihaj Nomura. Nagoya: Nagoja Esperanto-Centro, 1989. 21+512p. 25cm. Bind. Kolosa konkordanco de esprimoj uzitaj de Zamenhof: indikas la fonton kaj la tutan koncernan frazparton por redoni la kuntekston. Kun detala indekso. 129,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18,5% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Foliume

• Dulingveco ne estas tiom kutima revua trajto, en la senco ke aperas paralelaj tekstoj en Esperanto kaj alia lingvo. Tial kaptis nian intereson, ke sendepende lanĉiĝis du veraj dulingvaj revuoj en la pasinta jaro. *Esperanto-95* (8, rue de l'Eglise, F-95520 Osny, Francio) kaj *Internacia lingvo* (E-Fondaĵo "Fernando Soler", Duque de Calabria 4, E-46005 Valencia, Hispanio) celas kaj movadan kaj nemovadan publikon, per varia enhavo – novaĵoj, artikoloj, bildoj, poemoj, enigmoj, kaj ĉe la franca, ŝercoj kaj sprita komentario. Ni esperas, ke ankaŭ la movadoj en aliaj franc- kaj hispan-lingvaj landoj profitos el tiu laboro kaj pliigos la internaciecon de la du revuoj.

• Indekso: Ne tre inspira temo, vi eble pensas, sed kiel ĉe kuirlibroj, tiel ankaŭ ĉe revuoj: bona indekso estas utila. Laŭdojn tial speciale meritas *La gazeto*, kiu aperigis apartan kajeron pri la enhavo de siaj unuaj kvar jarkolektoj. Tiuj detalaj listoj laŭ revunumero, aŭtoro kaj temo (sub la rubrikoj Artikoloj, Esperanto – lingvo, Esperantujo, Fotoj, Grafikaĵoj, Humuraĵoj, Intervjuoj, Leteroj, Revuoj, Tekstoj, Tradukintoj, Recenzoj) tentus ĉiun ajn legemulon tuj aboni... kaj verkemulojn tuj artikoli! Ambaŭcele turnu vin al *La Gazeto*, 39, rue Joseph Hénrot, F-57070 Metz, Francio.

• Laŭte!: La "dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista", kiun eldonas la respondeculoj pri SAT-Broŝurservo, provizas forumon por fascinaj diskutoj. Familia E-instruado, scienco kaj religio, E-gramatiko, nuklea energio, la ĉeĥa revolucio, rasismo kaj sennaciismo, joko, *La danĝera lingvo*, ukraina kulturo, militrifuzado, ekologio – jen temoj el la nuna jaro. Abonu por 40 FF ĉe Esperanto, Cargue Sac, F-47470 Beauville, Francio (ĝiroj, ĉekoj al "Cercle Amical Esp. Agenais", pĉk 3371 74M Bordeaux).

• Meridians 12-23: Tiu plejparte angla-lingva revuo de la slovaka literaturo, kiun eldonas Unuiĝo de Slovakaj Verkistoj, denove presis pli ol 40-paĝan Esperantan apendicon en sia numero 13. Tie oni trovas superrigardon pri la lastatempa slovaka prozo, fragmentojn el verkoj de seso da nuntempaj verkistoj, intervjuojn kaj komentariojn. Mendu senpage ĉe Zväz slovenských spisovatel'ov, Obrancov mieru 14, CS-815 08 Bratislava.

• Monda merkato: "Mi nun aktivas en Esperantujo preskaŭ dek jarojn. Ekde la komenco mi ricevis leterojn, en kiuj esperantistoj de la tuta mondo petis min fari ian servon por ili." Tiel Albert Schubert enkondukas novan periodaĵon, kiu celas fariĝi malmulekosta reklamgazeto por la movado. Ĝi aperados en 1000 ekzempleroj kaj riceveblos kontraŭ sendokostoj; espreble la enspezoj pro reklamoj pagos la produktadon. Petu provekzempleron ĉe Linguistisches Bureau Alfred Schubert, Schluderstr. 17, D-8000 München 19, FR Germanio.

• Pióro: La pola aŭtorino Julia Pióro postlasis amasan verkaron el poemoj kaj noveloj, kiuj kune konsistigas grandiozan tuton: "La Mondo en Meditado". La plejparto el tiuj verkoj neniam aperis. Ŝia filo Jan Pióro zorge kolektis kaj katalogis ĉiujn, kaj nun serĉas rimedojn por eldoni ilin. Kiu volas helpi, skribu al li ĉe Reja 15/19, PL-05-820 Piastów, Pollando (donacoj al konto pior-y ĉe UEA).

Loke

• **Belgio:** Ĉe aŭtomata monŝanĝaparato en Bruĝo oni povas ricevi instrukciojn kaj kvitancon en Esperanto. Temas pri prototipa maŝino de la Ĝenerala Ŝparbanko, kiu ŝanĝas fremdan monon kontraŭ la belga valuto. Oni esperas vendi la maŝinon internacie, kaj la servo en Esperanto estos ĉie aldonebla laŭ peto.

• **Brazilo:** Jam de multaj jaroj la Studgrupo Zamenhof en la urbo Salvador laboras per ĝemelaj rilatoj kun afrikaj esperantistoj. Precipe s-ino Aldacy De Sousa Xavier ne laciĝas, korespondante kaj sendante legolibrojn transmaren. Laste la grupo elektis la libreton *Mi vizitis grandan urbon* de togolanda esperantisto Gbeglo Koffi: tiu bona legaĵo samtempe pruvas, ke ankaŭ Afriko produktas originalan literaturon, kaj ĝia vendado kuraĝigas eldoni pli da afrikaj verkoj. Mendu mem ĉe la Libroservo de UEA:

• **Ĉinio:** La ĝeneralaj sekretarioj de la provincaj E-asocioj en Ĉinio (kie provinco same grandas kiel ekz. pluraj eŭropaj landoj kune) kunvenis de la 26-a de februaro ĝis la 1-a de marto en la orienta marborda urbo Qingdao. Oni varme diskutis, kiel sukcesigi la korespondan E-kurson akompane al la nacia televida kurso, kiumaniere evoluigi la movadon ĝis pli alta nivelo, kaj kiel plej bone prepari la 5-an Pacifikan Kongreson, kiun Qingdao gastigos en 1992.

• **Irlando:** La revuo de la Lingvistika Instituto de Irlando, *Language Teacher/Múinteoir Teanga*, publikigis en sia aŭtuna numero du artikolojn pri Esperanto. Aŭtoroj Máire Mullarney kaj Christopher Fettes prezentis la lingvon kiel idealan enkondukon al la lingvolernado en la baza kaj meza lernejoj.

• **Portugaliao:** Iom malfrue atingis nin la ĉikuna foto, kun klarigo de la sekretario de Portugala E-Asocio, W. Sacramento. Okaze de Zamenhof-vespero en Lisbono, grupo de "doktoraj amatoraj kantistoj" akompanis sian kolegon Faria de Bastos en la portugala kantstilo "fado". Prezentiĝis ankaŭ ĥoro de la Soveta-Portugala Amikeca Societo, antaŭ partoprenantaro kiu inkluzivis tridekon da hispanaj esperantistoj.

• **Togolando:** Ekde oktobro 1989 la klubo "Nova Sento" en Lomé kunvenas ĉiudimanĉe, kaj tiam faras ankaŭ kurson. Venis multaj novaj lernantoj, kiuj lernas sub la gvido de Dweggah-Milavo Dolayi, Foley A. Ekue kaj Gbeglo Koffi, kaj per multaj lernolibroj donacitaj de Unuiĝo Franca por Esperanto. Ĉe la unua Landa Kongreso, fine de marto en Aneho, multaj progresantoj prezentis siajn poemojn, skeĉojn kaj kantojn.

• **Usono:** Subita vigliĝo rimarkeblas en la nordokcidenta angulo de ĉi tiu landego, kie Seatla E-Societo, Eldonejo Cigneto kaj nova muzika-teatra E-societo kunlaboras pri aro da projektoj. Baldaŭ eblos informiĝi pli detale pere de la bulteno *Ĉiam verda*: skribu al Seattle Esperanto Society, 6002 NE 61st St., Seattle, WA 98115. Aliloke en la sama ŝtato, Esperanto estis unuafoje prezentita kiel elektelebla studtemo en


bazlernejo en la urbo Clarkston.

Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, la usona landa asocio, ŝajne ambicias pravigi sian nomon. La ĉi-jara ELNA-kongreso okazos en Meksikurbo inter la 7-a kaj 12-a de julio, do tuj antaŭ la Universala Kongreso en Havano. Por pliaj informoj kontaktu ELNA, PO Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. Ĉu baldaŭ... en Montrealo?

Nekutima muzika prezento ornamis Zamenhof-vesperon en Lisbono: vidu sub "Portugaliao".



Fake



• **Alfabetigo:** Ankaŭ Internacia Kultura Servo en Zagrebo markis Internacian Alfabetigan Jaron, per 10-taga programo fine de marto. Inter 12 planitaj prelegoj, du rilatis rekte al Esperanto: prezento de Fondaĵo Talento el Hungario (tiu prelego fakte ne okazis) kaj raporto pri la dulingva edukado de infanoj, de Zlatko Tišljár. Per la helpo de esperantistoj IKS sukcesis kunmeti ekspozicion de pli ol 500 infanaj lernolibroj el 116 landoj kaj en 140 lingvoj, kiun HEA montros en Budapeŝto en junio.

• **Diplomverko:** László Szilvási, eksprezidanto de Hungara E-Junularo kaj nun la gvidanto de la registrejo-eldonejo Lingvostudio, ricevis duan diplomon ĉe la universitato pri internacia komerco en Budapeŝto. La temo de lia diplomverko estis: "Merkatesplorado kaj konkurenccanalizo pri korespondaj Esperanto-kursoj". En Hungario jam 3 organizaĵoj okupiĝas komerce pri tiaj kursoj.

• **Ekonomiko:** Hungara esperantisto Gábor Márkus fariĝis prezidanto de nova Liberala Demokrata Ekonomikista Societo, kiu celas peri ideojn kaj esplorojn pri transformo de la hungara planekonomia sistemo en sukcesan merkatan ekonomion. La Societo, kiu jam ricevis financan subtenon el Hungario kaj Usono, uzas la hungaran, la anglan kaj Esperanton kiel siajn oficialajn lingvojn. Kunlaboremuloj

skribu pere de Hungara E-Asocio, Pf. 193, H-1368 Budapest.

• **Filatelio:** Memore al la 130-a datreveno de la naskiĝo de d-ro Zamenhof, pli ol dek urboj en Ĉinio emisiis oficialan poŝtan stampon. La poŝtaj fakoj en Pekino kaj tri aliaj urboj emisiis ankaŭ memoran koverton aŭ poŝtkarton. Aparte notinda estis poŝtkarto de Pekina Okcidenta Distrikto, kiu montris ĉiujn Zamenhof-portretajn poŝtmarkojn eldonitajn ĝis nun.

• **Katolikismo:** Du novaj episkopoj en orienta Eŭropo estas esperantistoj: mons. Karel Otčenašek, de Hradec Kralové, Ĉeĥoslovakio, kaj mons. György Jakubinyi, de Bukareŝto, Rumanio.

• **Komerco:** La ĉeĥa firmao A.C.T., kiu aktivas pri la eksporto, importo, interŝanĝo kaj perado de diversaj varoj, ekuzas Esperanton apud siaj aliaj laborlingvoj (la angla, germana, itala, franca, araba, rusa, ĉeĥa). Por pliaj informoj skribu al Květa Hubnová, U průhonu 6, CS-170 00 Praha 7, Ĉeĥoslovakio.

• **Interlingviko:** Sesioj pri la lingvopolitiko okazos dum la kongreso de la Internacia Asocio pri Politikscienco, 21-25 julio 1991 en Buenos Aires. Krom "Modeloj de lingvaj decidoj" kaj "La teorio de oficialaj lingvoj", la tria prefera temo de referaĵoj estas

"La monda politiko de lingvoj". Referemuloj povas sendi proponojn al kaj ricevi detalojn de prof. Jonathan Pool, Dept. of Political Science, DO-30, University of Washington, Seattle WA 98195, Usono.

• **Tradukado:** Francaj esperantistoj starigis rilaton kun komerca tradukentrepreno, kaj jam sukcese kunlaboris en la perado de lingvoj, kiujn tiu entrepreno ne disponas. Ekzemple, traduko el la franca en la portugalan okazis per telekopia sendo de Esperanta versio al Brazilo. La firmao pagas 4 FF por ĉiu linio de teksto. Tiuj, kiuj ŝatus kunlabori (kio komence postulas investon, kaj, ideale, eltrovon de kunlaborema tradukentrepreno en la propra lando), turnu sin al la provizora sekretario: Claude Bodson, Montigny en Cis, F-59225 Clary, Francio (faksn-ro 27 85 83 29).

Persone

• **Auld:** Feste al sia emeritiĝo, la poeto (kaj tradukisto, redaktoro ktp) William Auld vizitis kun sia edzino Meta orientan Azion fine de la pasinta jaro. Interalie ili partoprenis en la Pekina Zamenhof-festo, kiun ĉeestis kvarcento da homoj. Ni atendas kun scivolo la rezultojn de emeritiĝo ĉe unu el la plej produktemaj talentoj de la Esperanta literaturo.

• **Buttinger:** Kredeble iun rekordon starigis ges-roj Buttinger el Londono, Anglio. Dum la lastaj 30 jaroj tiu gastama paro malfermis sian domon al pli ol 3000 esperantistoj. Ili eĉ eltenis tiajn streĉojn, kiel la alvenon de 17 esperantistoj en unu nokto,

aŭ 50 en unu monato! Evidente Londono delonge havas pli ol unu E-centron...

• **Chong:** La ĉefredaktoro de *La espero el Koreio*, Puramo Chong, pasintjare aperigis libron ĉe la granda eldonejo Kyobo pri siaj vojaĝoj tra orienta Eŭropo. La libro, kiu ofte mencias Esperanton, respondas al kreskanta intereso pri tiu mondoparto en Koreio.

• **Ŝilo:** Aktiva esperantisto kaj fondinto de la E-klubo en Slavjanska, Gennadij Ŝilo, estis kandidato en la lastatempaj elektoj por la Ukraina Supera Konsilio. Cetere, jam referendumo inter la ukrainaj esperantistoj pri aliĝpeto al UEA kvazaŭ respiegulas la politikan evoluon al sendependeco en la dua plej granda sovetia respubliko.

Oficiala informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Brazilo: José Mário Marques. Britio: Jonathan Cooley; Antony C.J. Rawlinson. Francio: André C.J. Gaillard. F.R. Germanio: Albrecht Kronenberger. Italio: Renato Corsetti. Japanio: H. Hukumoto; Fumio Inumaru. Koreio: Lee Jong-ha. Svedio: Franko Luin.

DONACOJ 1990 (gld.) ĝis la 12-a de marto

FONDAĴO AFRIKO: Britio: B. Phillips 37,80; L. Mee 25,00. Finnlando: H. Tietti 109,85; T. Sormunen 100,31. Italio: Nanda Borromei 79,92; Vittoria Spina 150,20. Kanado: Claude Lebus 16,54; Klivo London 24,81; R. Brisebois 16,54; P.P. Gan-

ĉev 23,16; D. Dufort 19,85; S.I. Norvell (jr) 57,89. Nederlando: G.F. Makkink 77,00; C. Bossong-Singer 23,00; R. Moerbeek 100,00. Svedio: J. Hammarberg 15,00. Diversaj malgrandaj 8,27. Sumo ĉi-jara 885,14.

FONDAĴO AZIO: Britio: N. Williams 30,73. Sumo ĉi-jara 30,73.

FONDAĴO CANUTO: Kanado: Claude Lebus 16,54; D. Dufort 16,54; S.I. Norvell (jr) 49,62. Nederlando: Anonime 3000,00; Frisa Esperantista Rondo 57,10. F. Zeller 77,00; E. Burg 100,00; J.L. Hut 10,00. Nov-Zelando: R. Harding 1076,90; Svedio: U. Luin 101,00. Diversaj malgrandaj 7,61. Sumo ĉi-jara 4512,31.

FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI (en usonaj dolaroj): Kanarioj: Maria Pi Maynar 100,00; Aurelio Solis y Pi 100,00. Sumo ĉi-jara 200,00.

ĜENERALA KASO: Britio: R.C. Hoather 55,37; B.L. Marshall 15,95; H.R. Morton 16,05. F.R. Germanio: H. Detmers 31,50; I. Pahnhenrich 23,63; J. Weidacher 31,54; M. Moschner 90,12. Nederlando: "Merkurio" 500,00; W. Akkerman 10,00. Norvegio: K. Gustavsen 72,75. Svedio: L. Andersson 76,95. Usono: G. Harabagiu 63,13; D.C. Halley 92,50. Diversaj malgrandaj 41,86. Sumo ĉi-jara 1121,35.

ASOCIA KAPITALO: Nederlando: C.M.v.d.Geest-Esveld 1000,00. Sumo ĉi-jara 1000,00.

RUMANIO: Kanado: P. Collinge 150,00. Nederlando: N.C. Kuiterman-v.Goor 100,00. Sumo ĉi-jara 250,00.

FONDAĴO SCIENCO KAJ TEKNIKO: Usono: S.S. Culbert 96,15. Sumo ĉi-jara 96,15.

FONDAĴO TEJO: Norvegio: A. Fitjar 14,85. Sumo ĉi-jara 14,85.

FONDAĴO WÜSTER: Finnlando: L. Oterma 214,44. Kanado: B. Crisp 87,45. Nederlando: J.L. Hut 30,00; BSO 5000,00. Diversaj malgrandaj 5,00. Sumo ĉi-jara 5336,89.

ESPERANTO CENTRO BIALYSTOK: Francio: Gilbert Gerrier 32,95. Nederlando: F. Zeller 75,00. Sumo ĉi-jara 107,95.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Starigo de Voluntula Fondaĵo

La kunlaboro de junaj volontuloj en la Centra Oficejo restas ege utila, kaj al UEA kaj al la movado ĝenerale. Ĉiujare deko da gejunuloj el tiom da landoj pasigas po kelkaj semajnoj en la oficejo, praktikante sian lingvoscion en internacia medio, lernante pri la movado, kaj akirante scion pri la oficeja laboro. Ofte tiuj spertoj poste tre utilas al ilia landa aŭ loka movado.

Unu el la ĉefaj deziroj de la forpasinta direktoro de la CO, Neil Salvesen, estis starigi kapitalon por ebligi al pli da gejunuloj profiti el tiu sperto. Tial ni nun anoncas la malfermon de Voluntula Fondaĵo, kies renton oni uzos sen tuŝi la donacitan kapitalon. La kolegoj de Neil en la oficejo jam kontribuis al la lanĉa sumo de la fondaĵo. Ni atendas baldaŭ povi anonci pri aliaj grandaj donacoj.

La familio de Neil konsentis kun ni pri la taŭgeco de tiu maniero memori dediĉitan kaj idealisman direktoron.

Serĉas amikojn 22-jara Adam Szwiec, ul. Świerczewskiego 22/8, PL-22-600 Tomaszów Jubelski, Pollando.

E-rondeto "Amikeco" el Ĉeska Třebová (Ĉeĥoslovakio) aranĝos en oktobro letervesperon okaze de la 30-a datreveno de sia fondiĝo. Ĉiuj salutantoj ricevos respondon. Unu letero estos ellotumita, kaj al la sendanto ni garantios 7-tagan senpagan restadon en nia urbo. Skribu al: Cilka Kotyzová, Drobného 1112, CS-56002 Ĉeska Třebová.

Kaligrafo, direktoro de Kultura Buroo de la urbo Huangshan deziras kontakti tutmonde pri kaligrafio, turismo kaj kulturo. Donacos kaligrafiaĵon kontraŭ 2 irk. S-ro Zhang Yiqing, Cultural Bureau of Huangshan City, Anhui, Huangshan, CN-245000, Ĉinio.

Nova adreso de Georgo Kamaĉo ekde majo 1990: Jorge Camacho, Chantada 43 1-J, E-28035 Madrid, tel. 34 + 1 - 739 5652.

Por bildkarta ekspozicio (temo: urbo-domoj de la mondo) respondojn petas Esperanto-klubo, CP 1111, R-3400 Cluj-Napoca, Rumanio. Ni recipros.

Instruistoj! Jen konkurso por viaj gelnantoj 7-14-jaraj: Ĉiu konkursanto faru nigra-blankan desegnon de homoj aŭ

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas unu guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon.

Anoncetoj

bestoj kiuj interparolas Esperante. Ni uzos desegnojn de la gajnintoj en *La revuo de Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo*, vi kaj ĉiu gajninto ricevos ekzempleron. Sendu desegnojn kun nomoj kaj aĝoj de konkursantoj al Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo, 3876 Belmont Avenue, San Diego, CA 92116, Usono. Ni bedaŭras, ke ni ne povas resendi desegnojn.

Nederlanda kompanio en la kampo de merkatesploro serĉas junajn kunlaborantojn. Celo: starigo de loka branĉo. Necesas: universitata diplomo, propriniciatemo, multlingveco, vojaĝpreteco. Pliajn informojn: d-ro Hans Adriaanse, r+m b.v., Geleenstraat 72, NL-6411 HT Heerlen, Nederlando (tel. 31-43-713483, faks. 31-43-716477).

Dank' al la subteno de ILEI kaj de s-roj L. Lentaigne, G. Pirlot, E. Symoens, Hou Zhiping kaj Soliva, mi kompilis kaj eldonis la libron pri E-eduko titole *La situacio de E-instruado en superaj lernejoj*. La libro resumas la skizon de E-instruado en 174 superaj lernejoj de 32 landoj. leĝon pri E-eduko de 30 landoj, enhavas la adreson de 170 lernejoj kaj 180 kursgvidintoj, konigas la celojn, konsiston, sciencistajn gradojn kaj titolojn de AIS. Vi povas ricevi ĝin kontraŭ nur la sendokosto: 4 irk aŭ US\$2, ĉe la kompilinto WANG Xigen, Shitai-xian, Ren-shi-ju, CN-245100, Anhui, Ĉinio.

Verkisto, 37-jara, deziras korespondi tutmonde Esperante, angle pri ĉiuj temoj. Gong Xuesheng, Nanzhang Baoshe, Hubei, CN-441500 Ĉinio.

Filatelistino deziras korespondi, interŝanĝi p.m., E-insignojn. Huang Guozhen, PO Box 63001 (antaŭe 22), CN-430063 Wuchang, Hubei, Ĉinio.

Bangalora E-Centro dankas ĉiun, kiu skribis al ni. Ni estas malgranda grupo, do ni ne povas respondi al ĉiuj 300 leteroj, kiujn ni ricevis. Bonvolu akcepti ĉi tion kiel individuan dankon.

Kisangania Esperanto-Klubo ŝanĝis adreson: novaĵojn, leterojn, revuojn, lernolibrojn ktp sendu al ĝi ĉe B.P. 403, Kisangani, Zairio.

ALVOKO AL INTERESITOJ

Por ricevi – senpage – Esperantajn broŝurojn pri Bibliaj temoj, ankaŭ studkurson, skribu tuj al: **Internacia Biblio-Misio, 28 Partis Way, Bath BA1 3QG, Britio**, bv. menciante ref. JEB 101.

*Kun profunda danko
pro plurdekjara amplena prizorgado
ni funebras pri*

Brigitte FRANK-BÖHRINGER

1936.05.17 (Esslingen) - 1990.03.14 (Paderborn)

Helmar, Ines kaj Tilo Frank

GRANDAJ EVENTOJ OKAZAS EN ORIENTEŬROPAJ LANDOJ

Legu en "SENNACIULO"
Monata organo de S.A.T.

– la raportojn
– la artikolojn

de SAT-membroj el tiuj landoj.

**Proveksemplero kun abontarifo havebla
kontraŭ internacia respondkuponon ĉe:
S.A.T., 67 avenue Gambetta, F-75020 PARIS**

Jen ĝi estas – la longe atendita libro:

LA INTERNACIA JUBILEA ESPERANTO-KONFERENCO CENT JAROJ DE ESPERANTO-KULTURO

Ampleksa raporto pri la plej grava kultura evento en 1987, enhavanta:

1. la lastajn paroladojn de Prof. D-ro Ivo Lapenna kaj de D-ro Paul Neergaard;
2. superrigardon de la 100-jaraj kulturaj atingoj. Lekciistoj: Albault, Régulo Pérez, Gacond, Marjorie Boulton, Ragnarsson, Neergaard, de Zilah, Mayer, Thierry, Zelazny, Lapenna;
3. rezoluciojn, fotoreportaĵon ktp.

Eldonita de "FONDAĴO IVO LAPENNA", redaktita de D-ro Klaus Perko, Aŭstrio.

Formato A5, broŝurita, 170-paĝa, verdkolora, glita kovrilo. Prezo: 175 d.kr. inkl. afranko.

Mendu ĝin ĉe la Libroservo de UEA (50,70 gld.) aŭ rekte ĉe "FONDAĴO IVO LAPENNA", kasisto: Peter Zacho, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio, pĉk.: København 1190601.

MEMORLIBRO

GRAZ 1987

Pro la forpaso de Neil Salvesen, la ĝisnuna direktoro de la CO, UEA serĉas kandidatojn por la posteno de

GVIDA ADMINISTRANT(IN)O.

Ni atendas de la dungoto sperton pri oficeja kaj financa administrado, plenan regon de Esperanto kaj vastan konon de la Esperanto-movado, same kiel maturan, diplomatan kaj reprezentan personecon. Kandidatigaj leteroj kun plenaj biografiaj informoj estu adresitaj al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Se necese, bv. telefoni +31 10 436 10 44 (Simo Milojević).

La Oomoto-Lernejo de Japanaj Tradiciaj Artoj

Du-semajna seminario por Esperantistoj, kiu emfazas la efektivan praktikon de tradiciaj artoj de Japanio.

datoj: **1990 aŭgusto 10-25.**

loko: **Kameoka, Japanio.**

plena prezo (inkluzivas loĝon, manĝojn, ktp.):

US\$500 por homoj el pagipovaj landoj,

US\$300 por nepagipovaj.

Petu informon kaj aliĝilon de: **Internacia Fako, Oomoto, Kameoka-si, Kyoto-hu, 621, Japanio.**

Ĉu vi jam konas tiujn librojn?

H. Bermanno (eld.): Pri la absoluta malnecese mortigi la Akademion de Esperanto; 40 p.; 8 DM

H. Bermanno (eld.): La ora libreto pri "maĵorio" kaj Bernard Golden; 20 p.; 5 DM

Rikardo Ŝulco: La esenco de la Analiza Skolo (la teksto de lia fama prelego 1988 en Paderborno); 12 p.; 4 DM

Mendu ĉe UEA, ĉe via libroservo aŭ rekte ĉe la eldonejo.

**Esperanto-Centro Paderborno
D-4790 Paderborno, Poŝtfako 1450**

Kiu bezonas ion

en Portugalio, ekzemple ferii, aĉeti domon, terenon, vilaon, k.t.p., skribu al

Manuel Pinguinha, Apart. 269,
2 503 C. Rainha Codex
PORTUGALIO / Portugal

UNUA AFRIKA KONGRESETO

17 decembro 1990 - 7 januaro 1991

Lomé - Cotonou - Abidjan

Prezo: 4150 gld.

**Foriro ebla je 10 decembro
kontraŭ nur 245 gld. plie.**

La prezo inkluzivas komfortan loĝadon kaj veturadon (flugon ekde Parizo), plenan programon, solidaran pagon por subvencii la partoprenon de afrikanoj, sed ne la manĝojn, vizojn, vakcinojn ktp.

**ĈIUJ DETALOJ ESTAS PROVIZORAJ.
FRUA ANONCO DE VIA INTENCO
PARTOPRENI POVUS EBLIGI
MALALTIGON DE LA PREZO.**

**Bonvolu signali vian intereson al la Centra
Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando.**

desegnis Ousmane Diédhiou,
sendis Alphonse Diatta

Turisma firmao ĉe Bulgara Esperantista Asocio esperantoturist

organizas partoprenon en ekskursoj kaj aliaj Esperanto-aranĝoj en Bulgario, ripozon ĉe la Nigra Maro, vizitojn al renesancaj bulgaraj urbetoj, renkontiĝojn kun esperantistoj en tuta Bulgario.

Adreso:

Str. Pozitano 40

1000 Sofio, Bulgario

tel. 003592-882472, telekso 23599 kabini bg

Filatela unikaĵo!



Memoriga poŝtmarko pri la 75-a UK en Havano: 4,50 gld.

Memoriga koverto kun poŝtmarko kaj surpriso: 6,00 gld.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA.